

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 571 (6)

JUNIO 1953



(foto : *Vjesnik*, Zagreb)

Primitivaj muelejoj ankoraŭ funkciantaj ĉe Pliva, Jugoslavujo. La tuta konstruaĵo estas el ligno. Nenia feraĵo estas uzita.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Jara abono (1953) : 15 ŝil. anglaj (kun
membrecio kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅛ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6000

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represadon al nia redakcio.



Enhavo

Specialaj artikoloj :					paĝo
Esperantismaj problemoj : <i>Hans Jakob</i> ..	..	..	..	..	182
Esperanto-literaturo en bibliotekoj ..	..	..	..	..	188
La Fenomeno de la Esperanta Literaturo : <i>Reto Rossetti</i> ..	..	..	..	..	193
Pesimismo kaj optimismo : <i>Hans Jakob</i> ..	..	..	..	..	177
38a Universala Kongreso :					
Oficiala Komunikado n-ro 7 ..	..	..	..	..	185
Belarta Konkurso ..	..	..	..	..	184
Radio-Zagreb ..	..	..	..	..	186
Poezio :					
Krizo : <i>E.A.H.</i> ..	..	..	..	..	187
Rakonto :					
Oazo en danĝera vivo : <i>Paul Heinrich</i> ..	..	..	..	..	196
Konstantaj rubrikoj :					
Centro de Esploro kaj Dokumentado ..	..	..	..	..	183
Enigma Konkurso ..	..	..	..	..	207
Esperantista Vivo ..	..	..	..	..	205
Internacia Konkurso ..	..	..	..	..	188
Nia Forumo ..	..	..	..	..	192
Oficiala Informilo ..	..	..	..	..	208
Radio kaj Esperanto ..	..	..	..	..	206
Tra la Libraro ..	..	..	..	..	189
Tra la Mondo Esperantista ..	..	..	..	..	179

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 571 (6)

Junio 1953



Pesimismo kaj optimismo

IDEALISMA klopodado kiel estas la enkonduko de internacia help-lingvo bezonas sian tempon. Iam ni kredis je rapida sukceso, ne koninte ankoraŭ ĉiujn kontraŭulojn de la ideo. Tio kondukas nature je skeptika prijuĝo de nia afero. Ekstaras la pesimisto, kiu kvankam konvinkita pri la utileco de la ideo, eble eĉ batalinte por ĝi, malkuraĝiĝis vidante la daŭran klopodadon sen videbla sukceso oficiala, t.e. rekono flanke de registaroj. Jen li diras: Nun ni penadas jam pli ol kvindek jarojn, ni kunvenis en sennombraj kongresoj, ni posedas atentindan literaturon, regule okazas kursoj. Tamen la nombro de la aktivaj esperantistoj estas preskaŭ ĉiam samalta, neniuj registaro kuraĝas fari decidan paŝon antaŭen kaj dekreti la devigan instruadon de Esperanto.—Li daŭrigas tiel, ĉiam vidante nur unu flankon de la afero. Li konkludas opiniante, ke ĝi estas certe valora ideo, sed videble kondamnita daŭre batali ĝis eble iam la mondo rekonos la utilon, kaj decidoj konformaj estos prenataj kiuj respondas al nia deziro.

Lin kontraŭas alia homspeco: la optimisto vidante ĉion rozkolore. Li fanfaronas pri niaj sukcesoj efektivaj aŭ imagitaj, de rezolucio favora al

Esperanto, akceptita en iu grava kunveno aŭ kongreso, li jam deduktas efektivan akcepton de la lingvo: ĉiu bonvola aprobo de eminentulo (kiu mem ne havas la tempon por lerni la lingvon!) li kredigas al si kaj aliaj, ke tiu ĉi kaj tiu eminentulo estas Esperantistoj kaj similaj fantaziaĵoj. Manifestacioj de senkritika fervoro!

Kiu pravas el ambaŭ? Neniu. La objektiva analizanto serĉas la originon de ĉio kaj observas la akcesoraĵojn akompanantajn ĉian agadon. Li konstatas, ke efektive la penado estas longedaŭra, ke spite la multajn kuraĝigajn okazaĵojn la vojo estas ankoraŭ longa ĝis la celo. Sed li trovas ankaŭ la kaŭzon de ĉio. Li ne serĉas ĝin en la agantoj, en la neperfekta organizo. Li vidas la realon tia, kia ĝi estas.

Li konstatas plie, ke spite la influon de du katastrofoj falintaj sur la homaron, ŝanĝintaj la socion, spite la malpermesojn de registaroj en landoj gravaj por ni, la malaperon de tiom da valoraj fortoj dum la dua milito, la ŝanĝitajn kondiĉojn ekonomiajn, la erarigon de la publiko en iuj landoj pri la problemoj de internacia lingvo, kaj ĉefe la inertecon homan; *Esperanto ekzistas*. Rimarkinde ja estas, ke en landoj kie

ĝi estis malpermesita, ĝi ree ekstaris kiel fenikso el cindro, ke subite aperis novaj homoj sur la scenejo. Tia analizado ankaŭ rigardas ĉirkaŭ si kaj esploras aliajn gravajn sociajn movadojn. Ĝis ekzemple kristanismo fariĝis ĝenerala, necesis jarcentoj; ĝis la sociaj movadoj por plibonigi la ekonomian staton de la laboristoj estis rekonitaj, necesis pli ol jarcento; kaj ĝis la ĉarto de la homrajtoj fariĝis leĝo, almenaŭ sur papero, ankaŭ necesis jarcento! Oni povas facile longigi tiun-ĉi liston.

Jen la vera situacio. La konkludo estas ke la pesimisma rigardo estas absolute malprava, ĉar ĝi pretervidas esencajn faktorojn tiom homajn kiom sociajn. La neforigebla fakto estas, ke ni Esperantistoj *pruvis* al la mondo ke sinteza lingvo funkcias, servas kaj ĉefe kapablas krei tion kion oni nomas **patriotismo** en nacia vivo. Jes, ekzistas ankaŭ patriotismo esperantista, kies lando estas la tuta tero kaj kies nacio estas la homaro. Jam Doktoro Zamenhof sentis, ke oni bezonos longan tempon ĝis realiĝos la ideo al kiu li donis formon. Li esprimis ĝin en la bela poeziaĵo *La Vojo*, kies lastaj linioj diras:

L' espero, l' obstino kaj la pacienco—
jen estas la signoj per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro!

Hans Jakob.

FONDAĴO MONTEVIDEO

Post tre detala diskuto pri la situacio, ekestinta post la grava Rezolucio de UNESKO koncerne Esperanton, la Estraro de U.E.A. konstatis, ke el ĉiuj vidpunktoj estus treege utile, se ni povus sendi kompetentan observanton al la 8-a Kunveno de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, kiu okazos en 1954 en Montevideo.

Konsciante pri la fakto, ke la nuna financa situacio de U.E.A. ne permesas antaŭvidi la eblecon sendi reprezentanton al Montevideo, la Estraro decidis dum la Paska Kunsido krei tuj apartan fondaĵon por tiu celo. La Estraro esperas, ke la pli bonstataj esperantistoj volonte finance kontribuos al tiu fondaĵo kaj tia maniere ebligos al nia Asocio esti reprezentita en la konferenco, kies decido povas havi historian gravecon por la plua disvastiĝo de la Internacia Lingvo.

La donacojn por la fondaĵo oni bonvolu sendi aŭ rekte al la Centra Oficejo en Rickmansworth aŭ al la ĉefdelegitoj de U.E.A. kun klara mencio, ke temas pri donaco por la "Fondaĵo Montevideo". La nomoj de ĉiuj donacintoj estos publikigitaj en nia revuo.

*E. Malmgren,
Prezidanto de U.E.A.*

Valora kaj utila libro estas la nova eldono de

NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO

de Louis Bastien, Akademiano

317-paĝa, bele presita kaj bindita. 12ŝ. 6p., aŭfranko 6p.

Mendu ĉe vialanda librejo aŭ ĉe U.E.A.



Tra la Mondo Esperantista



Aŭstrujo

Danke al la konstanta intereso por nia afero flanke de la Ĝenerala Poŝta Direktoro, D-ro Dworschak, la Poŝta Administracio eldonis ree serion de poŝtkartoj kun vidaĵoj kaj plurlingva teksto klariga, inter ili Esperanto. La serio de 11 poŝtkartoj montras vidaĵojn el Vorarlberg kaj Tirolo.

Ĉeĥoslovakujo

Malgraŭ la estingiĝo de nia movado en tiu ĉi lando kelkaj grupoj daŭrigas la laboron, inter ili la Esperantista Rondeto ĉe Kleriga Societo Komensky en Brno. Venis al ni informo pri Zamenhofa Memoriga Vespero, 17an de Aprilo, kun tre riĉa programo de kantoj kaj muziko. Gratulon al la persistemaj samideanoj en Brno.

Brazilo

Novaj Kursoj. La Departemento de Publika Servo de la Ŝtato Rio Grande do Sul starigis oficialan Esperanto-kurson en la kadro de sia laboro plialtigi la kulturnivelon de la ŝtata oficistaro. La Departemento fiksas je 70 la nombron de enskriboj, sed sin anoncis por la kursoj multe pli da interesiĝintoj, kaj ne estis eble al multaj partopreni la kurson, gvidatan de klera lingvoinstruisto Kolonelo Wanderley Francisco Gonçalves. La kurso daŭros kvar monatojn, kaj je la fino ĉiu aprobita lernanto ricevos oficialan ateston.

En la Pontifika Katolika Universitato de Porto Alegre funkcias kurso de Esperanto kun grandnombra partoprenantaro. La kurso estas organizita de la Centra Gvidkomitato de la universitataj studentoj, kaj gvidata de samideano Ivo Sanguinetti.

Placo E S P E R A N T O. Porto Alegre, kiu jam posedas tre belan straton kun la nomo *ZAMENHOF*, havos ankaŭ placon nomatan *ESPERANTO*, kies inaŭguro okazos en la venonta 14a de julio. Laŭ iniciato de samideano Alberto Flores, la urbkonsilantaro akceptis leĝproponon pri la nomigo, prezentitan de D-ro Ary Sanhudo.

Esperantista Societo de Porto Alegre. La komunumo de Porto Alegre, kiu antaŭ tri jaroj deklaris ke la Societo havas publikan utilecon, pagis al ĝi ĝis nun subvencion de dekmil kruzejoj, kaj ŝtato Rio Grande do Sul, tri mil kurzejojn. Ambaŭ monhelpoj estas ĉiujaraj.

Hispanujo

En Barcelona nia samideano Rafael Gisbert organizis Semajnon Esperantistan de la 29a de marto ĝis la 4a de aprilo. Dum la tuta semajno okazis ekspozicio, prelegoj Esperantlingvaj (inkl. de belga kaj hungara gesamideanoj) kaj priesperantaj prelegoj hispanlingvaj (inkl. de la temo "La diverslingva problemoj kaj ĝia solvo per Esperanto" disvolvita de D-ro

M. Solá). La inaŭgura soleno brile sukcesis.

La Nacia Radio intervjuis la organizanton, kaj tiu stacio kaj Radio Barcelona konstante dum tiu semajno dissendis sciigojn kaj raportojn pri la Semajno Esperantista. Krome pluraj naciaj ĵurnaloj bonege raportis pri la afero. Rezultis kurso kun 30 lernantoj.

La filatela revuo *Alhambra* (Apartado 109, Granada) aperigas en ĉiu numero Esperanto-kurson. Ĝi regule enhavas artikolojn pri nia afero, interalie dulingvan artikolon (hispana kaj esperanta) okaze de la Nacia Kongreso de Esperanto en Valencia. En la aprila numero oni komencis aperigi la "Informinstanco de H.E.F. adresita al la Ministro de Nacia Edukado" pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, laŭ decido de la lasta Hispana Esperanto-Kongreso. La publikigado de tiu interesa dokumento daŭros en venontaj numeroj.

Jugoslavujo

De la 21-a ĝis 24-a de aprilo la esperantista klubo en Sarajevo gastigis la Konstantan Kongresan Sekretarion kaj edzinon, Gesinjorojn Mason Stuttard. En la unua vespero S-ro Stuttard prelegis sub aŭspicio de la Popola Universitato en plena salono pri la temo: La problemo de internacia lingvo, kun interpretisto Docento Ota Panzer.

La sekvantan tagon okazis intervjuo en Radio Sarajevo en kiu krom longa informilo pri la kongreso kaj Esperanto ĝenerale, S-ro Stuttard parolis mallonge en Esperanto.

La Konstantan Kongresan Sekretarion kun Docento Ota Panzer (kiu prelegos en la I.S.U.) kaj Prof. Ramljak akceptis la rektoro de la universitato S-ro D-ro Vaso Butozan

al kiu oni klarigis la celon kaj rolon de la Internacia Somera Universitato kaj la Esperanto-movado ĝenerale. Akceptante la inviton esti en la Honora Komitato de la 38-a U.K. D-ro Vaso Butozan esprimis varman aprobon por la ideo de Esperanto parolante pri ĵusa vizito al Amsterdam por konferenco de universitataj profesoroj kiu, laŭ la aserto de la sinjoro rektoro, estis multe malhelpata ĝuste kaŭze de la lingva problemo ĉar granda nombro de la partoprenantoj ne sufiĉe bone komprenis la oficialajn anglan kaj francan lingvojn.

Ankaŭ en aŭdienco kun la K.K.S. kaj la nomitaj Sarajevoanoj, la Kulturministro por Bosnio kaj Hercegovino, S-ro Ethem Ĉamo, akceptis esti en la Honora Komitato de la kongreso kaj esprimis sian deziron por la sukceso de Esperanto kaj la kongreso.

Dum tiu periodo la prezidanto de la registaro de Bosnio kaj Hercegovino forestis de Sarajevo sed komisiis sian sekretarion akcepti la gastojn kaj esprimi sian bedaŭron pro neeblo gastigi ilin. Dum du tagoj li tamen disponigis al Ges. Stuttard sian aŭton kun ŝoforo por vizitoj kaj veturado en kaj ĉirkaŭ Sarajevo. La prezidanta sekretario montris viglan intereson pri Esperanto entute kaj pri la progresoj faritaj kaj promesis tion komuniki al la prezidanto al kiu S-ro Stuttard transdonis inviton esti en la Honora Komitato de la Kongreso.

En la lasta vespero antaŭ sia foriro S-ro Stuttard prelegis antaŭ la esperantista klubo en Sarajevo pri "Universala Esperanto-Asocio". Ĉeestis multaj neesperantistoj inkluzive de reprezentanto de *Borba*, la plej granda gazeto de Jugoslavujo. Poste sekvis vigla kaj informa diskuto kun multaj demandoj pri la asocio, la

kongreso kaj la Esperanto-movado ĝenerale.

Entute en Sarajevo montriĝas granda favoro al Esperanto kaj profunda kompreno pri la signifo de la Internacia Lingvo.

Biografio de Tito. Preskaŭ ĉiuj jugoslavaj gazetoj raportis en la lastaj tagoj pri la aperonta *Biografio de Tito* en Esperanto. Grandan intereson vekis la fakto, ke la traduko estas el la originala anglalingva eldono, kiu en multaj rilatoj diferencas laŭ enhavo de la enlandaj eldonoj, kiuj estas reverkoj de la angla. Aparte interesas la publikon kaj intelektulojn la informo, ke la tradukon en Esperanto faris la Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro Mason Stuttard, en la daŭro de 32 tagoj aldone al siaj grandaj laboroj por la kongreso. La eldono estas en la manoj de la Esperantista Eldon-kooperativo en Ljubljana al kiu la aŭtoro, Vladimir Dedijer, cedis ĉiujn honorariojn.

Saarlando

Kelkajn monatojn post ekspozicio en Neunkirchen kelkaj fervoraj junaj geesperantistoj, gvidataj de malnova samideano O. Hoeh, aranĝis novan ekspozicion en Homburg.

La ekspozicio donis impresan bildon pri nia lingvo kaj nia movado. Ĝi ebligis novan kurson, kiu komencis tuj post la fermo de la ekspozicio. La plej gravaj Saarlandaj gazetoj raportis pri ĝi kaj pri Esperanto ĝenerale; Radio Saarbrücken sendis raportiston por intervjuo, kiun oni dufoje favore brodkastis.

La partoprenantoj de la unua post-milita kurso en Homburg fondis novan lokan grupon en la kadro de la Saarlanda Esperanto-Asocio.

Svedujo

Sveda Somera Semajno. La venont-somera prelegserio en Frostavallen, Höör (9–16 aŭgusto) ricevis bonajn apogantojn. La sveda ŝtato donas ekonomian subtenon por la temaro “Internacia kulturinterŝanĝo”, kaj la Sveda Instituto por Eksterlanda Informado kaj la sveda UNESKO-konsilantaro decidis kunlabori kun la Esperanto-Instituto, kiu aranĝos la prelegserion. Prelegos 6 personoj (Ivo Lapenna, Jugoslavujo; Julia Isbrücker, Nederlando; Lakshmiswar Sinha, Hindujo; Karl Söderberg, John Stenström kaj Jan Strönne, Svedujo).

Inter gravaj problemoj traktotaj estas la UNESKO-decido kaj la klopodoj de la Landaj Asocioj, kiam temas pri la daŭriga laboro.

Esperanto en la servo de la sveda ŝtato. Ek de 1953 la Ŝtata Ĝarden-Eksperimentejo en Alnarp, Akarp, Svedujo uzas Esperanton kiel resumlingvon en siaj laborraportoj. Tiuj aperas plurfoje ĉiujare kaj estas dissendataj al universitatoj, bibliotekoj, ĝardenaj eksperimentejoj kaj similaj en la tuta mondo. Ĝis nun oni ĉiam uzis kiel resumlingvon nur la anglan lingvon.

Espereble ne-svedoj, leginte la publikigaĵon aŭ tiun ĉi noton, esprimos al la eksperimentejo sian estimon por ke ĝi konstatu, ke oni ne faris vanan laboron kaj havis senbazan elspezon. La estro de la eksperimentejo estas Prof. Fredrik Nilsson, kaj la adreso kiel supre montrita.



Esperantismaj

Problemoj

GVIDO KAJ ADMINISTRADO

ARDANTA problemo fariĝas en nuna tempo tiu de la gvido de organizaĵo (ni precizigu, ke ne temas nur pri tiu de *nia* movado !) Oni konstatas, ke kun la etendiĝo de afero, kun la pligraviĝo de respondeco tiom morala kiom materiala, la emo ĉe multaj sin dediĉi je tia afero malgrandiĝas.

La statuto de UEA fiksas por Komitato kaj Estraro de la Asocio vicon da devoj eksterordinare longan. La plenumo de ĉi tiuj devoj parte ja dependas de la laŭtempaj kondiĉoj kaj ili ne estas egale ampleksaj. Tamen la tutaĵo okulvideble montras, ke temas pri metoda laborado, postulanta sinoferon aparte el vidpunktoj de tempo kaj de mono. La respondecoj estas dividitaj: Morale respondecas unue la *Komitato*, materie la *Estrararo*, ekzemple pri budĝeto kaj ĝenerale la financoj. La ĉefa ŝarĝo ripozas sur la Estraro de UEA, kiu sekve de la financa mizero tutmonda devis preni sur sin laborojn, kiuj en pasinta tempo estis parte plenumitaj de la administra organo de UEA, la Centra Oficejo. La Estraranoj laboras honorofice—tio signifas, sensalajre. Eĉ la vojaĝo al kongreso kaj rilataj elspezoj estas je ilia ŝarĝo. La gloro, labori por ideala afero kostas kare por ili.

La ŝanĝo en la socia strukturo precipe en Eŭropo konstatigis nete en la gvido de nia Asocio. Ne plu estas eĉ unu el la Estraranoj, kiu estas sendependa materie, ja eĉ kiu, krom per laboro, povus finance subteni la aferon. Grava, fundamenta


ŝanĝo. Hodiaŭ nia Estraro konsistas el homoj profesie okupataj kiuj dediĉas sian liberan tempon (kaj tion tre larĝe !) al Esperanto.

Granda parto de la plenumata laboro estas *skriba*. Estrarano estas por tiel diri edzigita kun skribmaŝino. Krom la volo plenumi la statutan devon, la rolo de Estrarano postulas fakajn scion kaj povon, tiel ke estas efektive malfacile trovi taŭgajn kandidatojn por la posteno. Ja ne mankas talentaj homoj en nia movado sed la elektebleco malgrandiĝas ĉefe pro manko de tempo aŭ de mono. Ja ne estas sekreto, ke spite la okhoran labortagon multaj intelektuloj estas devigataj labori multe pli ol iam antaŭe por ekzisti.

Estrarano devus esti homo pli juna (pli kliniĝanta je la direkto de 18 ol de 80 jaroj !), kvankam pli aĝaj personoj posedas kvalitojn ŝatatajn—ekzemple sperton, ekvilibron spiritan kaj se temas pri pensiuloj, ian materian sendependecon. Vidiĝas el la supraj linioj, kiom komplika fariĝos la konstituigo de Estraro, kies kvalitoj respondas al skribitaj kaj neskribitaj reguloj.

La efektive plenumanta organo administra estas la Centra Oficejo kaj ĝia stabo. Ja estas iom grandiga paroli nuntempe pri stabo, kiam oni scias, ke la tuta teknika laboro estas farata de kvar personoj. Tiu ĉi teknika laboro kompreniĝas el la administrado de la financoj, kalkuloj, registrado de la membraro, de la delegitoj, korespondado, preparo de

fino sur paĝo 187



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Grava Verko Baldaŭ Publikigota

Kun la helpo de kelkaj kunlaborantoj, post plurmonata intensa laboro, CED ĵus pretigis la manuskripton de verko, en kiu estas prezentitaj la atingajoj de Esperanto dum ĝia 65-jara praktika funkciado. La verko havas tri partojn.

En la unua parto, kiu havas la titolon "Esperanto kiel solvo de la problemo de internacia lingvo", estas prezentita la formiĝo, ekesto kaj evoluo de Esperanto. Tiu ĉi parto enhavas opiniojn pri la valoro kaj signifo de Esperanto, informojn pri la instruado de la lingvo, prezenton de la Esperanta originala kaj traduka beletristika literaturo, kaj de la scienca kaj faka literaturo en la Internacia Lingvo. Unu ĉapitro pritraktas la demandon de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto, alia prezentas la Esperanto-gazetaron kaj la lasta parolas pri la diversaj formoj de praktika aplikado de Esperanto, ekzemple en la komerco, turismo, radio, PTT, prelegvojaĝoj, korespondado.

La dua parto de la verko prezentas la Esperanto-organizaĵojn, iliajn celojn kaj la laboron.

La tria parto estas dediĉita al UEA. En tiu ĉi parto de la verko estas prezentita la historio de UEA, ĝia nuna organiza formo, la kultura agado, la praktikaj servoj, precipe la helpo de UEA dum la militoj, la atingoj de UEA ĉe la Ligo de Nacioj kaj UNESKO, la universalaj kongresoj, diversaj internaciaj konferencoj, kursoj kaj renkontiĝoj.

La ĉefaj kunlaborantoj de la verko estas D-ro Lapenna, Reto Rossetti kaj Hans Jakob.

Persono, kiu deziras resti anonima, pruntis la necesajn financajn rimedojn por publikigo de tiu ĉi grava verko. Tre verŝajne ĝi aperos antaŭ la fino de tiu ĉi jaro. La verko estos publikigita en Esperanto, por ke ĝi povu esti larĝe utiligata de la tuta Esperanto-Movado. La prezo de la libro estos fiksita tiel, ke la vendo de la tuta eldono kovru ĉiujn efektivajn elspezojn. Tuj post kiam, per la vendo de la libro, estos ricevitaj la elspezoj, la sama verko estos eldonita en la angla lingvo. Estus dezirinde, ke tio okazu antaŭ la Konferenco de UNESKO en Montevideo.

STUDO PRI TEKNIKAJ VORTAROJ ELDONITA DE UNESKO

La studo de la kunlaboranto de CED S-ro Pierluigi Marelli el Milano sub la titolo "La Teknikaj Vortaroj" aperis en la itala revuo "Macchine" en Milano. La Departemento pri Naturaj Sciencoj de UNESKO publikigis la saman studon en la angla lingvo la 3-an de Decembro 1952. La signo de tiu UNESKO-Dokumento estas Ref. 66/2D03. CED esprimas al sia kunlaboranto tre koran gratulon pro tiu grava scienca kontribuo al pli profunda kompreno de la problemo de teknikaj terminaroj.

PRESIGO DE LA DOKUMENTO CED/3

La konata dok.CED/3, kiun eldonis CED okaze de la UNESKO-

Konferenco en Parizo, estas nun presata en la franca kaj finna lingvoj. La finnan eldonon prizorgis la kunlaboranto de CED Mag. Vilho Setälä el Helsinki, dum la francan eldonon ebligis s-ro Albert Lienhardt el Mulhouse. Al ambaŭ eldonantoj CED estas dankema pro ilia iniciato kaj prizorgo de la publikigo.

Ni utiligas tiun ĉi okazon por atentigi, ke ne estas konsilinde publikigi la dokumentojn de CED, ĉu en Esperanto ĉu en nacia lingvo, sen antaŭa interkonsento kun ĝia honorofica direktoro.

ENKETO PRI LERNADO DE ESPERANTO

Jam multaj legantoj de nia revuo respondis al la enketo pri la lernado de Esperanto. Tamen, estus dezirinde havi ankoraŭ aliajn respondojn, por ke la rezulto de la enketo estu kiom eble plej reala. La esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne respondis, bonvolu relegi la informojn en la Marta numero de *Esperanto* p. 93.

DONACOJ AL CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 7-an de marto 1953 ..	133	19	2
Williams, S-ro H., Novzelando		5	0
Vegetarano, S-ro, Novzelando		5	0
Kennedy, S-ro D., Skotlando			
(nova donaco)	5	0	0
Maillard, D-ro, Francujo (nova donaco)	1	0	0
Shaw, S-ro F. W., Anglujo			
(nova donaco)	5	0	0
Lewin, S-ro M., Anglujo ..	3	0	0
Svisa Esperanto-Societo ..	8	0	0
Eichholz, S-ro R., Germanujo		3	0
Larsen, S-ro E., Danlando ..		10	0
Hispana Esperanto-Federacio	1	0	0
Stato 29-4-53	£158	2	2

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA en Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris 10, Francujo, aŭ al la Centro mem.

10.000 dinaroj

por la Belarta Konkurso

Laŭ propono de Akademiano S-ro Ivo Rotkvič, la Loka Kongresa Komitato decidis, en kunveno je la 2-a de Marto, subvencii la Belartan Konkurson per 10.000 dinaroj.

Jen vere belega gesto, ne nur de malavaro sed ankaŭ de digna ŝato al niaj verkistoj kaj artistoj. Kiu grupo aŭ individuo sekvos la iniciaton? Bonvenaj estos ĉiaj sumoj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj. La donanto povas, laŭ sia plaĉo, difini la kontribuon al iu aparta branĉo, aŭ lasi ĝin al la kaso de la Belarta Konkurso por ĝenerala pligrandigo de la premiaj rimedoj. Bonvolu amikoj de la Esperanta kulturo fari konvenan proponon en siaj grupoj! Oni informu pri donaco la sekretarion de B.K., R. Rossetti, 39 Willows Crescent, Birmingham 12, Anglujo.

Instruistaj aferoj

La nova kaj grava Mond-Konfederacio de Organizaĵoj de la Instruista Profesio okazigos sian unuan kunvenon de delegitoj en Oxford, Anglujo de la 31a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 1953. Povas esti Esperantistoj inter tiuj delegitoj. Por ke ili interrilatiĝu, estas konsilinde skribi frue al F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30, Anglujo, kiu povos informi ilin pri eventuala samtempa ĉeesto.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.) estas invitita sendi observanton al tiu kunveno.



38-a Universala Kongreso de Esperanto

25 julion—1 aŭguston, 1953

Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavujo

Banka konto : Narodna banka, Zagreb, no. 402-T-844

N-ro 7

OFICIALA KOMUNIKO

Majon 1953

Radio : La inaŭguro de la Esperantaj elsendoj de Radio Zagreb okazis laŭ aranĝo la 16-an de aprilo. La elsendoj okazas ĉiuŝaŭde je 24.05 (23.05 laŭ greniĉa tempo) per ondolongo 264.7 m. Nepre skribu al Radio Zagreb, Esperanto-fako, por danki kaj esprimi viajn dezirojn.

Honora Komitato : La unuaj nomoj por la Honora Komitato jam alvenis kaj ni havas la honoran anonci la jenajn :

S-ro Lazar Koliševski, Prezidanto de la Makedona Registaro ;

S-ro Aleš Bebler, Federacia Ŝtata Vicsekretario por eksterlandaj aferoj ;

S-ro Ethem Ĉamo, Prezidanto de la Registara Konsilantaro por Klerigo, Scienco kaj Kulturo de Bosnio kaj Hercegovino ;

D-ro Anton Melik, Prezidanto de la Registara Konsilantaro por Klerigo, Scienco kaj Kulturo de Slovenujo ;

Prof. D-ro Teodor Varićak, Rektoro de la Universitato de Zagreb ;

Prof. D-ro Vaso Butozan, Rektoro de la Universitato de Sarajevo ;

Prof. D-ro Kiril Miljevski, Rektoro de la Universitato de Skopeje ;

S-ro Mika Špiljak, membro de la Kroata Registaro ;

S-ro D-ro Miljenko Protega, Ŝtata Sekretario de Kroatujo por tribunaj aferoj ;

S-ro Večeslav Holjevač, Urbestro de Zagreb ;

S-ro Jaka Avšič, Urbestro de Ljubljana ;

S-ro Ivo Sarajčić, Direktoro de Radio Zagreb.

Monŝanĝejo : Responde al petoj, ni konfirmas, ke la entrepreno TURIST disponigos monŝanĝejon en la stacidomo de Zagreb kaj konstante en sia kontoro en Zrinjevac 18, Zagreb.

Aliĝo : La L.K.K. atentigas al samideanoj, ke la lasta dato por aliĝo al la kongreso estas la 30-a de junio. La L.K.K. malakceptos aliĝilojn post tiu dato. Ne prokrastu vian aliĝon, cetere ankaŭ tial ke oni certe devos atendi kelkan tempon por la vizo.

Statistiko (ĝis 30 apr.) : Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 45, Belgujo 8, Brazilo 3, Britujo 108, Danujo 57, Finnlando 8, Francujo 170, Germanujo 86, Ebura Bordo 4, Gvatemalo 1, Hispanujo 1, Italujo 21, Izraelo 1, Jugoslavujo 495, Maroko 1, Nederlando 35, Norvegujo 26, Novzelando 2, Pollando 1, Portugalujo 1, Sarlando 1, Svedujo 149, Svislando 29, Turkujo 1, Usono 5. Sume 1261 el 27 landoj (pasintjare 1164).

*Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.*

Inaŭguro de Esperantaj elsendoj en Radio Zagreb

LA 16-an de aprilo 1953 okazis en la studio de Radio Zagreb la unua Esperantlingva elsendo kun ĉeesto de D-ro Ivo Borovečki, prezidanto de L.K.K., Ivo Rotkvić, membro de la Akademio de Esperanto, Marinko Gjivoje, redaktoro de *La Suda Stelo*, D-ro Dalibor Brozocić, organizanto de la elsendoj en Esperanto, kaj Mason Stuttard, Konstanta Kongresa Sekretario. La elsendo, daŭranta 15 minutojn, konsistis el inaŭgura parolado de D-ro Borovečki, informoj pri la kongreso de la K.K.S., kaj parolado pri la lagoj de Plitvice de Ivo Rotkvić. Jen la parolado de D-ro Borovečki:

Karaj amikoj de la tuta mondo, La hodiaŭa tago havas apartan signifon por la jugoslava esperantistaro. Por la unua fojo en la historio de nia movado unu jugoslava radiostacio elsendas en la eteron salutvortojn en la Internacia Lingvo. La fakto, ke Radio Zagreb hodiaŭ komencas siajn elsendojn en Esperanto estas same grava kiel por la enlanda movado, tiel ankaŭ por la eksterlanda. La estraro de Radio Zagreb decidis organizi elsendojn en la Internacia Lingvo por tiamaniere de sia flanko kontribui al la pli granda sukceso de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta ĉi-jare en Zagreb.

Kiel Komitatano de Universala Esperanto-Asocio mi tutkore dankas al la estraro de Radio Zagreb pro la granda helpo al nia afero, kaj mi estas certa ke mi samtempe esprimas al ĝi ankaŭ la dankesprimojn de la esperantistoj el ĉiuj landoj. Al la relative granda nombro da radio-

stacioj utiligantaj Esperanton nun aliĝas ankaŭ Radio Zagreb.

En tiu ĉi solena momento mi salutas en la nomo de la Jugoslavia Esperanto-Federacio kaj en la nomo de la Loka Kongresa Komitato niajn samideanojn en la fora eksterlando kaj en ĉiuj lokoj de Jugoslavujo. Ĉi-momente ni ne sentu nin solaj, izolitaj. Miaj vortoj flugas fulmrapide al la plej malproksimaj landoj; miloj da esperantistoj dissemitaj tra la tuta mondo direktas nun siajn pensojn al Zagreb, kaj nin interligas ne nur la elektromagnetaj vibradoj de la zagreba radio; nin interligas la komuna Internacia Lingvo kaj la granda ideo de la internacia frateco kaj kunlaboro.

Kaj nun kelkajn vortojn pri niaj programoj en la Internacia Lingvo. La elsendoj okazontaj ĉiujaŭde estos dediĉitaj plejparte al niaj eksterlandaj amikoj. La programoj enhavos ĝenerale tri ĉefajn partojn. Unue vi povos aŭskulti la informojn pri la Universala Kongreso. Poste sekvos interesaj prelegoj pri Jugoslavujo, ĝiaj turismaj allogaĵoj, ĝiaj arto, scienco kaj kulturo. Estos organizataj apartaj elsendoj pri la literaturo de la jugoslavaj popoloj. Fine kiam la tempo permesos oni prezentos fragmentojn de la jugoslava popolmuziko.

La redaktoro de la Esperanto-fako de Radio Zagreb estas nia samideano profesoro Dalibor Brozović, asistanto ĉe la Akademio por Teatra Arto. La raportojn pri la Universala Kongreso preparos ĉiam la Konstanta Kongresa Sekretario.

Estas kompreneble ke ni atendas grandan helpon de vi, estimataj aŭskultantoj. Unue ni petas vin sendi dankesprimojn al Radio Zagreb kaj krome ne forgesu sciigi al ni pri viaj sugestoj, deziroj kaj kritikoj. Nur la aktiva helpo kaj kunlaboro de vi ĉiuj rezultigos fine tiom alt-nivelajn elsendojn ke nia movado povos fakte fieri pri ili.

Ĝis la Universala Kongreso Radio Zagreb disaŭdigos 16 elsendojn en la Internacia Lingvo. Sed memoru bone ke la afero koncernas ne nur la zagrebajn esperantistojn. Via ĉiufanka intereso, helpo kaj kunlaboro estos nepre bezona. Se ni nun bone sukcesos, se la reĥo el eksterlando estos kontentiga, ni povos plenrajte esperi ke Radio Zagreb decidus elsendi en Esperanto ankaŭ post la Universala Kongreso, kaj tion ni ĉiuj varme deziras. Do ankaŭ de vi dependas la sukceso !

Ni firme esperas ke la tutmonda esperantistaro apogos la grandan aferon kiun hodiaŭ komencis Radio Zagreb.

Krizo

(Dediĉe al *Krizo de nia literaturo* en la marta n-ro de *Esperanto*)

Vokis vigla voĉo, vipa vek-signaloj !
 Ĉu vi aŭdis la tamburon ?
 Ĉu vi servas la kulturon ?
 Ĉu vi sentas la mezuron
 de l'bataloj ?

Vokis varma voĉo ! Ĉu en vana vasto ?
 Ĉu nin trompis iluzio :
 Ĉu "la verda familio"
 tamen estas jam nenio
 krom bombasto ?

E.A.H.

Esperantismaj Problemoj (*de p. 182*)

raportoj kaj ilia multobligado kaj ankoraŭ aro da aliaj aferoj. Rezultas el tio, ke la ebleco elekti kvalifikitajn oficistojn ne estas granda. La salajro pagata, eĉ se ĝi estas pli malpli konforma al lokaj normoj, neniel kompensas la sinoferon de personoj laborantaj por celo idealisma. Tio ne nur rilatas al Esperanto kaj UEA ; oni trovas tiajn fervorulojn ankaŭ en aliaj celadoj.

La nuntempa neebleco certigi sekuran pozicion en la estonteco ja fortimigas kandidatojn maksimume kompetentajn, kaj oni ne sufiĉe povas danki al tiuj, kiuj estas pretaj sin dediĉi je tia kariero. Iam ekzistis la versimileco, ke dank' al propra laborado intensa ĉio evoluigos tiel prospere, ke nenia danĝero ekzistos por la vivteno deca. Ne necesas atentigi tie ĉi pri la gravaj perdoj kiujn suferis nia movado pro la politika kaj ekonomia ŝanĝo de Eŭropo. Tamen devas esti nia zorgo, certigi al niaj oficistoj decan salajron kaj sekurecon estontan. Kiel kaj kiamaniere, jen la problemoj kiujn ni devas solvi. Ili dependas ekskluzive de la stabileco de ekonomiaj kondiĉoj, la senkatena mon-interŝanĝo kaj—nefororgesinde—de la kompreno de iuj aktivuloj ke se milito postulas multan monon, ankaŭ la laboro por efektivigi la pacon bezonas ĝin.

Hans Jakob.

Ĉu vi povos helpi ?

Seriozaj kaj sindonemaj esperantistoj, kompetentaj lingve pri Esperanto fake pri ŝoseoj, pontoj kaj publikaj laboraj, pretaj kunlabori al faka terminaro, anoncu sin al samideano Broise, inĝeniero, Ponts et chaussées, Longué (Maine et Loire), Francujo.

Esperanto-literaturo en bibliotekoj

En kunlaboro kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA okazos en la venontaj monatoj internacia enketo pri la Esperanto-literaturo en publikaj bibliotekoj. La iniciatinto de tiu ĉi enketo estas Prof. D-ro Wannemakers, S. J., kiu antaŭ kelkaj monatoj en "Scienca Revuo" publikigis sian proponon rilate supre-nomitan enketon.

Ĝi celas :—

1. ekscii en kiu grado la Esperanto-literaturo jam troviĝas en publikaj bibliotekoj.
2. ekscii, kio estu en la estonteco la plej efika kaj taŭga agado de la Esperantistaro sur tiu ĉi tereno.

Ĉar pro diversaj cirkonstancoj nuntempe multaj eldonoj el la Esperanto-literaturo ne plu aŭ tre malfacile estas troveblaj, dum ju pli Esperanto evoluas kaj estas aplikata, des pli grandiĝas la valoroj de la antaŭaj eldonoj, tiu ĉi enketo povas doni gravajn informojn kie oni povas konsulti, pruntepreni aŭ fotokopiigi tiujn eldonojn. Ĝi povas ankaŭ esti stimulo por la taŭga distribuado de la plej gravaj libroj kaj revuoj al la publikaj bibliotekoj.

La gvidanto de tiu ĉi enketo estas s-ro F. Winkel, Plataanweg 18, Rotterdam (Schiebroek), Nederlando. Ĉiuj esperantistoj estas petataj sendi al tiu ĉi adreso kiel eble plej baldaŭ la necesan enketmaterialon. Jen sekvas la demandaro de la enketo :—

1. Kiuj publikaj bibliotekoj (lokaj, regionaj, institutaj) posedas fakon de Esperanto-literaturo? Bonvolu indiki la nomon, adreson kaj karakteron de la bibliotekoj.

2. Kio estas proksimume la nombro de la Esperanto-libroj en ĉiu ?

3. Kio estas proksimume la nombro de la Esperanto-revuoj en ĉiu ?

Se eble :—

4. Kiuj abonoj al revuoj estas daŭrigataj ?

5. Kiuj gravaj revukolektoj tie troviĝas ?

6. Kiuj maloftaj libroj tie troviĝas ?

7. Kiuj maloftaj revuoj tie troviĝas ?

8. Ĉu ekzistas presita katalogo de la libraro ?

Internacia Konkurso 1953

Stato je la 30a de aprilo

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Maroko ..	600	690	115.0
2. Aŭstralio ..	900	985	109.4
3. Germanujo ..	3200	3235	101.1
4. Svislando ..	1450	1435	99.0
5. Japanujo ..	900	870	96.6
6. Urugvajo ..	250	240	96.0
7. Danlando ..	2500	2395	95.8
8. Aŭstrujo ..	800	765	95.6
9. Francujo ..	5200	4922	94.7
10. Belgujo ..	2200	2045	93.0
11. Sudafriko ..	300	275	91.7
12. Italujo ..	2400	2205	91.5
13. Finnlando ..	2200	1955	88.9
14. Britujo ..	10000	8774	87.7
15. Usono ..	2300	1912	83.1
16. Hispanujo ..	1500	1220	81.3
17. Nederlando ..	4600	3720	80.9
18. Svedujo ..	5500	4200	76.3
19. Kanado ..	300	225	75.0
20. Portugalujo ..	600	450	75.0
21. Kubo ..	250	185	74.4
22. Islando ..	450	310	68.9
23. Norvegujo ..	2100	1435	68.3
24. Irlando ..	250	155	62.0
25. Novzelando ..	900	550	61.1
26. Argentino ..	500	300	60.0
27. Jugoslavujo ..	1500	600	40.0
28. Brazilo ..	6500	30	0.5



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.

Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.

***Tributo al Nobla Geniulo**, de Edmund Yardley, tradukis el la angla lingvo Francis R. Jones, eldonis Land and Liberty Press Ltd., Londono. 18.5 × 12.5 cm., 56 paĝoj, broŝ. Prezo 4 ŝil., afranko 3p.

Ĉi tiu alloga broŝuro pritraktas viron, kies politikekonomiaj doktrinoj estas jam sufiĉe vaste konataj, sed kies persona karaktero estas malpli familiara al la publiko. Henry George (1839–1897), la usona predikanto de la principo de ter-valora impostado, estas iasence komparebla kun Zamenhof, ĉar ambaŭ viroj celis la forigon de grandaj malbonoj kaj kredis ke ili trovis la ĝustan manieron por efektivigi la reformon: Zamenhof esperis forigi intergentan malamon, pere de konvena neŭtrala lingvo, kaj George esperis forigi malriĉecon kaj ekonomian tiranecon, pere de nova sistemo de impostado—kiu, laŭ lia kredo, igus nenecesa ĉiujn aliajn impostojn naciajn kaj lokajn.

Ambaŭ viroj estis praktikaj idealistoj, en la senco ke ili ne nur priploris gravajn malbonojn, sed elpensis metodojn por ŝanĝi la situacion. Kaj ambaŭ estis homoj de elstara persistemo, granda pacienco, kaj ne-estingebla fido al siaj projektoj.

La celo de la nuna broŝuro estas montri la altan personan karakteron de Henry George, ne precize kiel apostolo de la ter-imposta doktrino mem, sed kiel altprincipa kaj filantropa reformanto, kies ĉefa vivcelo estis plibonigi la ekonomian

staton de la popolamaso. Kiel oni montras je la fino de la verketo, liaj principoj jam iagrade aplikiĝis en pluraj landoj: sed, kion ajn povos kredi la leganto pri la efiko atingebla per plena sekvado de la principoj, li sendube konsentos ke ĉi tie estas prezentata—plejparte el la buŝoj de personaj amikoj de George—karaktero plej alte admirinda: cetere, kiu bone speguliĝas en la bela fotografa portreto aperanta en la broŝuro.

Bernard Long.

***Tutmonda Laŭdo**. Preĝlibro de pastro Wannemakers, S.J. Eld. Esperanto Film-Grupo, Bergen-op-Zoom, Nederlando. 277 paĝoj, 8 × 13 cm. Bindita, prezo 11ŝ.

La famkonata kaj vigla Esperanto Film-Grupo en Nederlando eldonis en taŭga bindaĵo bonan katolikan preĝlibron, kiun multaj Esperantistoj ĝojos vidi kaj posedi.

Jen modesta kaj tre grava apliko de Esperanto en la religio. La ampleksa enhavo vere plivastigas la titolon, ĉar ja estas vere ke la tuta mondo devas laŭdi Dion. Preĝado estas la interparolado de la homoj kun Dio kaj pro tio la aŭtoro kolektis belajn preĝojn de sanktuloj el diversaj liturgiaj ritoj. Per tio la preĝlibro iĝas vere tutmonda preĝaro kaj respondas al neceso en la nuna tempo. La belaj ilustraĵoj el ĉiuj partoj de la mondo akcentas la internacian karakteron de la Kristana arto kaj la adapt-

kapablecon de la religio al ĉiuj homaj spiritoj.

La unua parto konsistas el ĉiutagaj preĝoj : maten- kaj vesper-preĝoj kaj preĝoj por ĉiu tago de la semajno. La dua parto entenas serion da belaj preparaj preĝoj por la sankta komunio. En la tria parto ni havas la meson, centro de Kristana vivo. En la kvara parto ni vidas : preĝojn el diversaj ritoj, preĝojn por la sankta konfeso, la sanktan krucvojon, preĝojn honore de la sanktega Koro kaj de nia ĉiela Dipatrino Maria. Kiel finon ni havas diversajn tre konatajn kantojn, prenitajn el la katolika kantararo.

La preĝlibro prezentiĝas sufiĉe bele, sed estas domaĝe ke la papero ne estas de pli bona kvalito ; plue, ore stampita bindaĵo estus pli bela kaj pli alloga. Entute, mi kore gratulas la verkinton kaj ege rekomendas al ĉiuj samideanoj la akiron de la preĝlibro. Uzante ĝin ni iĝos pli bonaj homoj.

A. Beckers, Prez. de IKUE.

Esperanto, Sprache der Völker, de D-ro Siegfried Ziegler. 16 × 10 cm., 32 paĝoj, broŝ. ; 0.30 g.m. Verlag Butzon & Bercker, Kevelaer (Rhld), Germanujo.

Broŝureto, de kiu germanlingvaj esperantistoj ĉiam havu ĉe si unu aŭ du ekzemplerojn. Parolinte pri la ideo de la mondlingvo en amika aŭ kolega rondo, dum vojaĝo k.t.p., oni ofte bedaŭras, ke mankas iu presaĵo, kiu post la disiro daŭrigas la varbadon kaj fine logas al studado de Esperanto.

Jen tia verketo ! Ĝi informas koncize pri la mondlingva problemo, la solvo per Esperanto, pri la movado, literaturo, gazetoj, organizoj k.t.p. La ĉefan parton okupas skemo de la gramatiko, kiun sekvas konversacieroj kaj tekstspecimeno.

Oni ne lernos la lingvon el ĉi tiu enkonduko, sed ĝi donos al interesitoj ĝeneralan panoramon pri la okupota novlando.

La broŝureto aperis en la kadro de "Malgranda Popolbiblioteko", kies multnombraj titoloj traktas diversajn temojn. La prospektoj estas multdisvastigitaj, kaj oni rajtas esperi, ke per ili multaj germanlingvuloj estos interesataj ankaŭ por la "Esperanto"-kajero. La recenzanto mem estas varbita por Esperanto antaŭ 30 jaroj per simila biblioteko.

Erick Dahlmann, Berlin.

Corso di Esperanto, de Corrado Grazzini, 3a eldono. Eld. Paolet, San Vito al Tagliamento ; 16 × 12 cm., 192 paĝoj, broŝ. 350 it.lir.

Detala lernolibro por italoj laŭ la kutima gramatika metodo kun ampleksa enkonduko pri la neceso kaj la historio de internacia lingvo kun speciala rilato al Esperanto. Ĝi estas dividita laŭ 16 lecionoj kun abundaj, trafaj, originalaj kaj ofte spritaj ekzercoj, kiuj multe faciligas la lernadon. Kelkaj klasikaj kaj modernaj legaĵoj prozaj kaj poeziaj instigas la lernantojn al plua interesiĝo pri la literaturo. En apendico la analiza traduko de la diversaj ekzercoj igas la libron taŭga ankaŭ por la meminstruantoj.

Mi rimarkis kelkajn nekutimajn formojn, ekz. "bontagon", "milnaŭcentkvindektri", "ĥino" k.a., anstataŭ "bonan tagon", "mil naŭcent kvindektri", "ĉino" laŭ la ĝenerala uzo.

Bedaŭrinde la tiom utila konversacia frazaro estas preskaŭ tute neglektita.

L.M.

SAT-Jarlibro 1952-1953. 152 paĝoj 14.5 × 10.5 cm. Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, Paris 20, Francujo.

Enhavas la kutimajn informojn pri SAT, kaj la adresaron de la membroj ; plie mondkarton kun SAT-sektoroj.

***Letero el la Transcendo** de A. B. Krempel. El germana lingvo tradukita de M. M. Mielert. 36 p., 19 × 12 cm., broŝ. prezo 2 ŝil., aŭfranko 2p. Eldonita de Limburger Vereinsdruckerei.

La libreto pritraktas en la kadro de rakonto problemojn de la postmorta vivo en tre impresplena maniero. La eklezia prespermeso garantias, ke la enhavo estas konforma al la katolika religio. Kvankam teologiaj problemoj estas pritraktataj, la stilo estas klara kaj ankaŭ komprenebla por nefakulo. Ĉe la frazo: "Mi tiam ne kredis la estantecon de Kristo en la Sakramento" verŝajne estus pli trafe anstataŭi la vorton "estanteco" per "ĉeestanteco". La traduko ree pruvas, ke Esperanto taŭgas ankaŭ por esprimi teologiajn ideojn.

Ludwig Thalmaier.

Peladjaran Bahasa Pantja—Benua Esperanto Ringkas Djelas. Oleh: Hasan Basri. (Gramatiko de Esperanto en indonezia lingvo). 94 paĝoj, 33.5 × 21.5 cm., ciklostile presita. Medan 1952.

La Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj. Esperanto-traduko de R. L. Harry, LL.B., B.A. Disdonita de la Canberra filio de la Aŭstralia Asocio por la Unuiĝinta Naciaro. 18 × 12.5 cm., 60 paĝoj, ciklostile presita. Canberra 1952.

Hannover, ĉefurbo de lando Niedersachsen, estas la grandurbo inter verdaĵo. La Trafika Oficejo eldonis faldprospekton kun urbo-plano, ricevebla laŭ peto ĉe Stadtisches Verkehrsbüro, Ernst-August Platz 8, Hannover, Germanujo.

OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Publika Kunveno de la Akademio dum la Universala Kongreso en Zagreb

En la kadro de la 38a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb okazos publika kunveno de la Akademio, en kiu la partoprenantoj havos la okazon direkti prilingvajn demandojn al la Akademio kaj libere diskuti pri lingvaj aferoj.

Proponoj por la tagordo de tiu kunveno devas esti sendataj al la adreso de la Akademio almenaŭ antaŭ la fino de junio. Ili povas esti duspecaj:

1. Oni povas formuli demandon pri iu lingva problemo rilata al Esperanto, pri kiu la Prezidanto kaj la aliaj ĉeestantaj Akademianoj donos sian opinion.

2. Oni povas mem enkonduki iun temon pri la lingvo Esperanto en la kunveno kaj defendi ĝin.

En ambaŭ okazoj povos sekvi liberaj diskutoj laŭ la disponebla tempo. Ĉar tiu tempo estos limigita, la Akademio fiksos antaŭe la tagordon kaj elektos por tio la plej gravajn demandojn kaj temojn, fiksante ilian sinsekvon en la pritrakto.

En la tagordo aperos ekskluzive demandoj kaj temoj de ĉeestantaj personoj.

La publika kunveno okazos en la mateno de la 29a de julio 1953.

Ir. J. R. G. Isbrucker, Prezidanto.



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ



Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Nia Literaturo

Doktoro Lapenna, en la *Marta Esperanto* senŝargigis sian menson pri la manko de gravaj sciencaj libroj en nia literaturo. Mi ĉiam pensas ke nia celo estas fari novajn Esperantistojn, sed ne instrui pri scienco. Pli ŝajnas ke la bezono estas por libroj kiujn la ĝeneralo de homoj ŝatus legi, en kiuj troviĝas la kutima ĉiutaga parollingvo. Ĉu iu pensas ke infano, junulo aŭ mastrumistino legus libron pri geologio?

Se iu dezirus studadi sciencon, li povus tion fari pli facile en sia nacilingvo. Nia problemo estas allogi komencantojn lerni la ordinaran lingvon de interparolo kaj korespondado. La detektivromanoj kaj amnoveloj, kiujn la aŭtoro tiel lamentas, estas plenaj de tia lingvo. Sed ĝi ne troviĝas en libroj pri botaniko.

Kiam sufiĉe da scienculoj fariĝos Esperantistoj por postuli sciencon literaturon, ni eldonu ĝin por ili. Intertempe donu al ni librojn kiujn Johano kaj Mario ŝatus legi, kaj per kiuj ili lernos babili Esperante.

*George E. Wagner,
Tampa (Fla.), Usono.*

Pri Unuiĝintaj Nacioj

Rilate al la demando, ĉu *Unuiĝintaj*, ĉu *Unuigitaj Nacioj*, ŝajnas al mi ke Prof. Lapenna tute pravas, dirante

ke la Organizaĵo estas unuiĝo, ne unuigo. Se necesas pravigi la Esperantan uzadon per cito de naci-lingvaj analogoj: en la Turka kaj Araba lingvoj la nomo de la organizaĵo estas respektive *Birleŝmiŝ Milletler* kaj *al-Unam al Muttahida*. En ambaŭ frazoj la participo estas refleksiva, kvankam en ambaŭ lingvoj ekzistas aparta pasiva formo. Se la Turkoj kaj Araboj, havante la du formojn, aŭtomate elektis la refleksivan, kial ni Esperantistoj hezitu? Ĉu uzado neeŭropa estas nepre evitenda?

G. L. Lewis, Oxford, Anglujo.

Al korespondantoj

Mi opinias ke multaj Esperanto-korespondantoj havas unu gravan kulpon. Ofte ili nur tre prokraste respondas al skribintoj. Estus pli konvene tuj respondi ol daŭre prokrasti dum la skribinto senpacience atendas dum pluraj semajnoj por ricevi respondon. Eble kiam oni ricevas leteron, oni bezonas kelkan tempon por skribi Esperantan leteron, sed certe ne bezonas plurajn semajnojn. Eble dum tiom da tempo, tiu kiu unue skribis, forlasos la esperon ke letero revenos. Tia hontinda praktiko ne kaŭzas bonan Esperantistan amikecon. Nepre respondu senprokraste!

*C. D. Prewitt,
Mt. Sterling, Ky., Usono*

R. Rossetti :

La Fenomeno de la Esperanta Literaturo

Resumo de parolado farita la 5an de Aprilo ĉe la
Londona Esperanto-klubo, okaze de ties Jubilea Festo

SE vi estas esperantisto de pluraj jaroj, verŝajne iu vin jam demandis : “Ĉu Esperanto havas literaturon ?”. Kaj eble vi respondis : “Ho jes ; ni havas la tradukojn de la *Biblio*, *Hamleto*, *Infero* de Dante, *Peer Gynt*, *Kon-Tiki* . . . ” Respondo prudenta kaj iagrade efika ; tamen ne tiom, kiom ni eble kredas. Ni transloku la interparolon sur naci-lingvan scenon kaj supozu, ke iu mondnaiva alilandano mire vin demandus : “Sed ĉu la angla lingvo—tiu mestizo de germana kaj latina gepatroj—povas havi literaturon ?” Kaj analoge vi respondus : “Ho jes ; ekzistas ja tradukoj el Balzac, Goethe, Cervantes, Dostojevski . . . ” Ĉu trafa respondo ? Nu, ne tre, ĉu ? Certe ni prefere citas Shakespeare, Dickens, Keats, kaj aliajn glorajn anglajn verkistojn.

Bone. Ni provu simile pri Esperanto. “Literaturon ? Plej certe ! Ni havas ja Zamenhof, Baghy, Kalocsay, Schwartz . . . ” Kaj kompreneble via demandinto diros : “Nu, kiuj estas tiuj Baghenhof kaj Schwarocsay ? ? Mi neniam aŭdis pri ili !”

Evidente tia respondo ne tre prosperus. Sed la sinteno enhavas tamen eron da pravo. Ĝi atentigas nin, ke sola citado de *tradukoj* povas doni al la fremdulo impreson pri ia pseŭda, parazita literaturo.

Unu fakto estas, ke sen originala verkado en iu lingvo, vivaj tradukoj tute ne estas riceveblaj. En sia letero pri la deveno de Esperanto (*Orig. Verkaro* p. 421), Zamenhof priskribas,

kiel la lingvo, post longaj penoj, ekviviĝis :—

“La praktiko ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan ‘ion’, la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan ‘spiriton’. . . . Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte pensi en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo . . . kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.”

Zamenhof do kreis la propre Esperantan stilon, la originalan idiomon de la lingvo. En tiun idiomon oni povis jam ankaŭ traduki. Sen ĝi la lingvo kapablus fari nenion, ĉar lingvo ĝi vere ne estus ; sed kun ĝi la lingvo kapablis ĉion, ĉar trovinte la propran, malfalsan voĉon, ĝi povis jam esprimi la sentojn : sonigi amon, koleron, indignon, bonhumoron, eĉ la ironion.

De tiu momento la sorto de la Esperanta literaturo dependis pure de la talentoj, kiuj venos uzi la lingvon.

Sekvis tempo de provado, dum kiu la gazeto *La Esperantisto* plenumis gravegan servon kiel instruilo de la originala idiomon. La Zamenhofa

prozo fariĝis bazo de ĉiu bona Esperanta stilo.

La periodo ĝis 1914 estis tempo de intensiva, elementa kulturkreo. Ĉiu bona verkisto sorbis kaj sekvis la stilon de Zamenhof. Se oni legas iliajn verkojn, oni apenaŭ povas distingi inter ili. Ĉefa escepto estas Kabe. Lian stilon karakterizas pli ŝpara, ol ĉe Zamenhof, uzado de afiksoj. La Kabea stilo ekspluatas la plej simplajn rimedojn por viva kaj plena sencefiko.

Post la unua mondmilito la prozistoj, sentante, ke la bazo estas jam firma, komencis disevolui, kaj oni povas jam distingi individuajn tonojn. Mi sentas, ke Baghy la plej fidele sin radikis ĉe Zamenhof, sed de tie elkreskis por sonigi sian apartan emociriĉan kaj tre homan voĉon. Jean Forge pli verŝajne sin modelis ĉe Kabe, sed trovis la propran vivan ritmon. Privat simpligas la Zamenhofan stilon kaj aldonas ian francan elegantan. La sangriĉa, aktualeca stilo de Schwartz galvanizas per nova signifo plej ordinarajn vortojn. Engholm fandis pure la Esperantan stilon en la diafana norda aero. Szilágyi—laŭ mia opinio nia plej frapanta originalisto—pensas ĉiam rekte en Esperanto, kaj lia stilo liveras al la leganto amason da semantikaj surprizoj. Sturmer luktas vigle kontraŭ la influo de sia gepatra lingvo. Kiam li eskapas, li trovas formojn primitive fortajn, kaj cetere la anglalingva influo, kiu tamen enŝteliĝas, ne estas tia eksterminda hidro, kiel li eble opinias. Entute stilo tre pozitiva.

Unika aperaĵo estas la stilo de Lanti. Stilo labora, kiu elĵetas ĉiun forlaseblan afikson kaj atingas en sia svelteco la kernan forton de homo pasie logika, pasie idealisma. Mi

opinias, ke ĉe li la Zamenhofa verko havis relative malmultan influon: Lanti estas en nia literaturo granda originaleca fenomeno.

Entute ni povas en Esperanto distingi tri klasikajn prozstilojn: tiujn de Zamenhof, Kabe kaj Lanti. Fleksebla tradukanto povas do elekti por ĉiu tasko la plej trafan el la tri. Pli fleksebla tradukanto ne sekvus tiajn kategoriojn, sed mem posedus sufiĉe vastan gamon por traduki konvenastile ion ajn.

* * *

En la Unua Libro de Esperanto troviĝas du originalaj poemoj de Zamenhof: *Ho mia kor'* kaj *Mia penso*. Ili estas (krom la aborta, sufoksenta poemo *La pluvo*) la solaj personaj poemoj de Zamenhof, kaj mi opinias, ke kun ili fermiĝas la libro de Zamenhof la poeto. La grandiozaj akordoj de *La vojo* kaj *Preĝo sub la verda standardo* estas esprimo de sento pormovada. Ili indikas la grandan komunan ŝarĝon, kiun Zamenhof surpronis. Tiam li apartenis ne plu al siaj *apartaj* idealoj, sed al la afero.

Mi opinias, ke en Zamenhof granda poeto estis sufokita. Tiu poeto verkis en knabaĝo kvinaktan tragedion. Tiu knabo revis fariĝi granda rusa poeto. Sed premegis lin lia rasa aparteno kaj la dolora konjunkturo, kiu tiris lian grandsentan koron en diversaj direktoj. Doninte Esperanton al la mondo, li volis tuj fariĝi nur privata ano de la lingvo. Sed la afero neforpeteble lin implikis: li trovis, ne ke li donis Esperanton al la mondo, sed ke li donis sin tutan al Esperanto. La privatulo Ludoviko Zamenhof ne rajtis ekzisti. La poeto Zamenhof estis kreinta unu ĉefverkon: Esperanton—poste li silentiĝis.

Privat atribuas la malmultecon de la Zamenhofaj poemoj al tio, ke la

sola kreado de la lingvo tro elĉerpis liajn fortojn. Tion mi ne kredas. Ĉar li devis gvidi la movadon, tial ĉio, kion li verkis, devis nepre havi komunan karakteron. Oni povas konstati kiel ĝena kaj kiel prema estis por Zamenhof tiu respondeco, kiel arde li volis demeti la publikan mantelon. Sed tion li povis fari nur tre malfrue en 1912, ĉe la Krakova kongreso.

La etoso de la movado ĝis la unua mondmilito estis tia, ke diversaj poetoj prenis la internan ideon kiel temon kaj imitis la publikajn poemojn de Zamenhof. Ni povas kompari ekzemple la sonorojn de Zamenhof kaj Grabowski :—

(Z) *Al Vi, ho potenca, enkorpa mistero,
Fortego la mondon reganta,
Al Vi, granda fonto de amo kaj vero,
Kaj fonto de vivo konstanta*

(G) *Agordu la brustojn, ho nia fratar',
Por nova, pli vigla jam kanto !
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
Anoncu al ĉiu dormanto.*

La Esperanta poezio ĝis 1914 havis unu karakterizan tonon, unu kvazaŭ anoniman voĉon. Tamen jam aperis kelkaj freŝaj voĉoj : Devjatnin, Schulhof, Privat.

Post la milito pli multe da poetoj alprenis Esperanton kiel ekskluzivan lingvon de arta kreado, kaj nia poezia lingvo komencis rapide evolui. Elsaltis poetoj kun tute individuaj tembroj. Miĥalski : bruska, hela baritono, pulsanta de pasio :—

*Rapide.
Streĉvervas muskoloj,
grakas amasoj da korvoj,
sentante mortontojn.*

Hohlov : melodia, emocivibra tenoro —(el *Chante-claire*) :—

*Saluton heroldo matena, tro frue, tro
frue vi krias :
Ankoraŭ forestas la lumo, eĉ unu radio
ne strias.*

Baghy : riĉe emocia baritono :—

*Lingvo ne havas tian vorton,
Kiu povus esprimi ĝin,
Kion mi sentas, mia kara,
Kun doloro amante vin.*

La blaga, konversacia tono de Schwartz :—

*Forviŝu viajn larmojn,—jen mia
nazotuk' . . .*

Kurzens : junula voĉo de alternaj ribelo kaj malespero :—

*Tedegis silento kaj krio,
tedegis infero kaj dio.
Eh ! Turni la dorson al ĉio,
kaj iri !*

Kaj Kalocsay — tuta orgeno (el *Sonoril-ludo*) :—

*Ho svingu la langojn
vi tondre batanta !
Lamento giganta
traringu la landon !*

Paralele sin etendis la voĉgamo en la tradukado de poemoj, ĝis en *Eterna Bukedo* Kalocsay sukcesis kun nekonkurebla artismo reprodukti la tembrojn de poetoj el 22 landoj.

Kiel ĉe ĉiu lingvo moderne evoluinta kiel literatura lingvo, la tradukado ludis por Esperanto gravan rolon, kaj hodiaŭ ĝi estas literatura lingvo ne nur matura, sed mirinde elasta kaj polifonia, eĉ pli, ol multaj naciaj lingvoj. Ofte kie la angla lingvo ne sukcesis doni taŭgan tradukon de poemo, Esperanto sukcesis brile. Tio estas de unu flanko domaĝo. Nome la tradukado de poezio estas kompromitita, kaj sekve kulturitaj angloj, ne imagante, ke alia lingvo povus sukcesi tie, kie la fera angla fiaskis, rilatas malŝate al la poemtradukado entute. Ni do devas iel insisti pri nia literaturo originala. Ĝi estas la bazo kaj la kerno. Ĝi vivu kaj kresku !

Paul Heinrich :

Oazo en danĝera vivo

LA jaro 1945 estis la jaro de la decido. En la jarkomenciĝo la popoloj de la militantaj ŝtatoj preskaŭ instinkte antaŭsentis tion. Tion ankaŭ proklamis la germanaj politikuloj. Rapide plenumiĝis la sorto de la granda germana regno, pri kiu la germana reĝimo antaŭe tiom triumfe fanfaronis. Malsukcesoj de la germanaj armeoj sur ĉiuj batalfrontoj kontraŭ la potencaj kontraŭuloj montris la sencecon de la milita daŭrigo. Tamen la germana reĝimo fanatike daŭrigis la kruelan militadon.

Dum frosta vetero senhalte enpenetris la rusaj trupoj en la orientgermanan teritorion. Seninterrompe veturilaj karavanoj de kamparanoj moviĝis okcidenten. La urbanoj kaj la vilaĝanoj klopodis savi sin per la lastaj vagonaroj. Piede multaj el ili malespere provis forkuri spite de la frosta malvarmo.

Sed ankaŭ la armeoj de la okcidentaj potencoj enmarŝis en la germanan landon. Intertempe el okcidenta direkto tage kaj nokte enflugis kvarmotoraj bombaviadiloj kaj sisteme bombadis germanajn urbojn. Preskaŭ ĉiuj germanaj urboj ruiniĝis.

Rapide penetris la aliancaj trupoj de la okcidentaj landoj orienten kaj la rusoj okcidenten. La germanaj trupoj kuntiriĝis kaj konstante malvastiĝis la teritorio kontrolata de germanoj. Neevitebla estis la plena malvenko germana. Tion certe sciis la germana reĝimo, sed obstine ĝi postulis la bataladon ĝis la kompleta pereco.

* * *

Ĉio verdiĝis kaj ekfloris kvazaŭ ĉifoje la naturo volis speciale soleni

sian reviviĝon post la vintra rigidiĝo. Varme karesis la sunbrilo la printempan verdaĵon kaj la herbejajn florojn en la Lüneburga Erikejo. La printempo en la jaro 1945 komenciĝis jam frue.

Sur monteto sudoriente de Munster staris grupo da germanaj soldatoj, por batali kontraŭ la antaŭenpenetrantaj anglaj soldatoj. Laŭ raportoj la usonanoj jam okupis Velzen, oriente de la surmonteta pozicio. Tiel okcidente, sude kaj oriente jam la kontraŭaj trupoj ĉirkaŭis tie la germanan pozicion, sed la surmonteta grupo atendis la venontan atakon el suda direkto.

La senarba monteto estis tute netaŭga por defendo, ĉar de granda distanco la kontraŭuloj povis observi ĝin. Tion konsciis ankaŭ la germana ĉefserĝento kun siaj dek soldatoj. Ili pensis iom nevidebligi siajn du kvar-tubajn kontraŭtankajn kanonojn helpe de foliaro kaj branĉetoj de kelkaj unuopaj arbetoj. Tamen ili restis preskaŭ senŝirmaj, precipe kontraŭ la rapidege kaj malalte flugantaj unumotoraj usonaj aeroplanoj kiuj svarmis ĉie.

La mieno de la soldatoj estis tre serioza. La ĉefserĝento—malnova soldato—montris neniun emocion, tamen li ordonis elfoson de tertruoj, por havigi iom da ŝirmo por siaj soldatoj en plej danĝera momento.

En la matenaj horoj ankoraŭ regis trankvilo escepte de unuopa kanon-pafego kaj la bruado de la aeroplanoj. La soldatoj frostotremis spite de la matena sunbrilo, pro manko de dormo. Pro nericevo de manĝaĵo en la antaŭa tago la malsato estis sufiĉe

granda. Sed kuriero de la kompanio asertis, ke certe manĝaĵoj estas hodiaŭ sendotaj.

Por pli bona observo sendis la ĉefserĝento la soldaton Hans Berger al la plej antaŭa rando de la monteto. Kun miksitaj sentoj iris la soldato tien. Antaŭ la dekliveto li haltis kaj bonŝance trovis arbetojn, kie li kaŝis sin. Streĉe li observis la pejzaĝon en sunlumo antaŭ si. Li vidis vastajn kampojn kun arbaro en la fono, el kiu pafegis la angla artilerio. Kelkaj montetoj limigis maldekstraflanke la rigardon. Hans Berger vidis la pafegojn ambaŭflanke kaj li kaŭris preskaŭ kiel neŭtrala observanto inter la artileria batalo. Eĉ li nun ĝuis la varmon de la suno, kaj li sentis sin iom sekura ĉar li konstatis ke la monteto ne estas la pafcelo.

Liaj pensoj migris malproksimen, al sia orientgermana hejmregiono, kie nun estis la rusoj. Kiom ofte antaŭe li imagis sian revenon hejmen, al siaj gepatroj kaj pli junaj gefratoj. Tio estis lia forta apogo kaj ĉiuj pensoj pri lia hejmo estis imago pri paco, feliĉo kaj sekureco. Nostalgion li sentis al siaj karaj familianoj kaj al siaj hejmaj trezoroj, kiuj estis libroj kaj multaj bagatelaĵoj. La plej feliĉa momento ŝajnis esti tiam, kiam li ree povos formeti la soldatan uniformon kaj revesti sin per siaj civilaj vestoj, labori kaj vivi en pacaj cirkonstancoj. Li estis ankoraŭ tre juna, kiam li soldatiĝis—preskaŭ knabo—kaj eĉ la kvinjara batalado ne povis preni de li la knabajn sopirojn.

Nun, tamen, la paco alproksimiĝis, sed alie ol kiel li estis imaginta ĝin. Kordoloron li sentis pri la necerta sorto de siaj gepatroj kaj gefratoj. Certe ili iel suferis aŭ eble jam ne vivis. Neniel li povis helpi ilin. Ĉi

tiuj pensoj tre turmentis kaj anime tro doloris lin.

Dume liaj okuloj observis la pejzaĝon. Neniu estis videbla kaj la horoj pasis. Dankema li estis pro sia soleca posteno. La spektaklo antaŭ li eĉ forgesigis lin pri liaj malsato kaj laceco.

En la posttagmezaj horoj ĉesis subite la interpafegado. Hans Berger sentis ke io grava okazos, kaj li streĉege observis la terenon. Tamen neniu videbliĝis en la vasteco de la batalejo, sed kiam momenton li rigardis malantaŭen, surprizite li vidis eliĝi amason da vunditaj germanaj soldatoj el la arbaro. Akre kontrastis iliaj blankaj bandaĝoj en la sunklara aero. Multaj lamis kaj estis subtenataj de aliaj kamaradoj, aŭ portataj sur portiloj. Ili preterpaŝis malantaŭ la monteton kaj celis al Munster, kie estis multaj hospitaloj.

Jen nova surprizo ! En Munster li vidis flirti la blankajn flagojn de la kapitulaco. Li estis tute konsternita pri tio. Certe la artilerio kaj la aliaj germanaj trupoj en la arbaro jam retiriĝis norden, ŝirmataj de la arbaroj, kaj nur la vunditoj iris al Munster, kiu kiel hospitala urbeto kapitulacis. Intertempe surdiga bruado de ruliĝantaj tankoj aŭdebliĝis, kiu proksimiĝante pli-fortiĝis. Denove streĉe li klopodis vidi ion, kaj ree vane. Malantaŭ la maldekstraj montetoj certe estis ŝoseo, sur kiu antaŭen ruliĝis longa vico da anglaj tankoj.

Intertempe alrampis kamarado kun la ordono por retiriĝi al la grupo. Ambaŭ nun formoviĝis malantaŭen, dum scivola aeroplano rondflugis super ili. Bonŝance ĝi ne pafis. La ĉefserĝento opiniis ke ili ne plu ricevos ordonojn, kiam subite aperis kuriero de la kompanio kun la raporto ke la

monteto estas ĉirkaŭata de angloj en vasta distanco kaj ke la monteta grupo batalu ĝis la lasta spiro. Poste la kuriero tuj retiriĝis.

Hans Berger sentis subitan abomenon pro la freneza mortordono. La ĉefserĝento akceptis trankvile la ordonon, sed ŝajnis iom paliĝi. La aliaj soldatoj silentis. Ili bivakis senvorte, tre mediteme, ĉirkaŭ la du kanonoj. Hans Berger tutanime kontraŭis la sensencan sinoferon. Finfine vesperiĝis sen apero de angloj, kontraŭe aperis neatendite ree germana kuriero kun la ordono je retiriĝo de la grupo dum la ŝirmo de la nokto tra la nova angle-okupita frontteritorio. Necesis 30-kilometra marŝo norden tra densaj arbaroj. Hans Berger plenspiris liberigite kaj samtempe ree rimarkis la malsaton, sed li sciis ke nenia manĝaĵo estos havebla ĉi tiun nokton. Ili diseksplozigis ambaŭ kanonojn kaj post noktiĝo ekmarŝis de la monteto.

Baldaŭ ĉirkaŭis ilin densa arbaro. Ili tramarŝis la grandan arbaran regionon de Raubkammer. Ĝi estas fama parto de la Lüneburga Erikejo. Silente kaj tre singarde marŝis la grupo, por ke ĝi ne renkontu la anglojn. La kuriero kiel vojkonanto kondukis ilin. La nura krakado de arboradikoj kaj branĉetoj jam explore ekatentigis ilin. Unufoje kiam ili atingis arbaran straton, ili aŭdis fremdajn vortojn kaj vidis neklare veturilojn en la arbaro. Kun plej ebla mallaŭtiĝo ili sukcesis kaŝmarŝi preter la anglan bivakon. Pasis kelkaj horoj ankoraŭ ĝis kiam fine la kuriero diris, ke nun ili jam estas preter la angla frontlinio kaj la singardemo jam ne estas necesa.

Hans Berger sentis la erikan tapiŝon sub si. Nun kiam ili venis en la liberan senarbaran erikejon, eĉ liaj

okuloj tiom kutimiĝis je la nokta malhelo, ke li povis vidi iom malklare ĉiun arbetojn kaj precipe la multajn unuopajn juniperojn, kiuj donas al la erikejo la plej pentrindan aspekton. Kelkfoje tiuj kreskaĵoj havis plej strangajn kolosajn formojn kaj kiam subite iu el ili konturiĝis el la malhelo, ektimis Hans Berger, opiniante ke aperas giganta tanko. Li serĉis la sencon de tiu ĉi milito kaj ne povis trovi ĝin. Restis nur la certa scio pri la neevitebla pereco de la hejmlando, kaj aperis eĉ la ekpenso pri kaŝa forlaso de la grupo dum la nokta marŝado kaj transkuro al la angloj. Sed tuj lia konscienco kontraŭis. Li ne volis esti malkuraĝa kaj malfidela. Eĉ se ĉio estis vana, li tamen ne volis agi kontraŭ la soldata disciplino. Li konsciis ke li alproksimiĝas neeviteble al iu katastrofo, post kiu ĉio ankoraŭ estis malluma kaj necerta por li. Lia prudento volis konsili al li la libervolan kapitulacon, sed li ne povis agi kontraŭ sia konscienco. Malklare li ankaŭ konsciis ke la militkaptiĝo certe estus humiliga kaj mizera stato. Do restis nur la espero ke la germana reĝimo okazigos milithalton, sed Hans Berger dubis ĉu la fanatikuloj celis tion. Neniul li sentis iun malamon kontraŭ la angloj kaj li sciis, ke ankaŭ liaj kamaradoj same pensas.

La kelkhora marŝo ne volis finiĝi. La lacaj okuloj de la soldatoj vidis daŭre la fantomajn siluetojn de la juniperoj.

Jam la gamboj tre doloris al la soldatoj, sed la ĉefserĝento ne permesis paŭzon. Li havis ordonon konduki la grupon al destinita loko kaj toleris neniun interrompan halton. Kaj li ja ne indulgis sin mem.

Ree ili atingis arbaron kaj kiam

ili tramigris ĝin, videbliĝis stratkruciĝo apud soleca bieno. Jen finfine la celo! Tuj unu soldato devis posteni kaj la aliaj povis serĉi dormlokon, inter ili Hans Berger. Ili surgrimpis ŝtupareton al la subtegmento de grenejo kaj kuŝiĝis sur la planko. Post momento ĉiuj ŝtone dormis.

La ĉefserĝento, sidante en ĉambreto de la bieno, studis la landkarton. Li tute ne povis imagi, kie la retiriĝo povos finiĝi. Oriente trans la rivero Elbe, ili certe baldaŭ renkontos la rusojn. Norde estis la havenurbego Hamburg, al kies defendo eble ili partoprenos. Nu, li esperis ke morgaŭ li aŭdos ion kuraĝigan de la kompanio kaj tio trankviligis lin. Li kuŝiĝis laŭlonge de benko kaj same rapide ekdormis.

Nur la postenanta soldato ankoraŭ suferis pro lacego kaj rapide iris tien kaj reen por ne ekdormi. Ĉiun momenton li rigardis sian horloĝon, kaj fine pasis la duona horo post kiam li povis veki alian kamaradon por posteni.

* * *

Krepuskiĝis kaj Hans Berger vekigis. Li rimarkis ke li tutkorpe tremas. Tro profunda estis lia dormo spite de la nokta malvarmo. Pripensante la daton li kalkulis ke estas la 17a de aprilo. Intertempe ankaŭ aliaj kamaradoj vekigis. De la bona korto signalis la ĉefserĝento. Ne estis tempo por korpa refreŝigo kaj purigo. La ĉefserĝento diris ke ili devas formarŝi orienten antaŭ la kompleta mateniĝo al urbeto, kie estas la propra kompanio. Do ili ekmarŝis esperante ke ili finfine ricevus iom por manĝi ĉe la kompanio.

Ili marŝis sur ĉefstrato nun kaj vidis la tutan amplekson de la katastrofo. Mallongdistance ili

renkontis dispaŝitajn kaj bruligitajn germanajn aŭtomobilojn. La usonaj aeroplanoj radikale detruis la germanajn transportilojn. La ĉefserĝento ne atentis la detruitaĵojn. Lia celo estis la kompanio. Li ĝojis ke li povos raporti al sia kompaniestro la sukceson plennombre reesti. Ofte la soldatoj devis kaŝi sin pro la aeroplanoj sed fine post kelkaj horoj ili atingis la urbeton. La kompaniestro laŭdis la ĉefserĝenton, dum la kompaniaj soldatoj akceptis la dek kamaradojn kun multe da ĝojo pro la neatendita revido. La plej ĝojiga afero estis la informo ke la soldatoj kuiros manĝaĵon speciale por la grupo, kaj post horo oni vokis la dek soldatojn al la disdono de la manĝaĵo. Ĝi konsistis el faba supo kaj ĉiu povis plenigi sian manĝujon. Treege ĝi bongustis al la grupanoj post tiom da malsato.

Dum la dek soldatoj avide manĝis, atingis la kompanion la alarma komando je laŭ eble plej rapida retiriĝo, ĉar anglaj tankoj alproksimiĝis. La dek soldatoj ĉagrenite fermis siajn duone malplenajn manĝujojn kaj rapidis al aŭtomobiloj, per kiuj la tuta kompanio estu fortransportota. Rapide ĉiuj ŝargis la armilojn sur la aŭtomobiloj kaj fine ĉiuj mem suraŭtomobiliĝis. La retiriĝa celo estis Lüneburg. Ankaŭ la dek soldatoj ĝojis pri la kunesto kun ĉiuj kamaradoj, sed apenaŭ ili forlasis la urbegon, kiam iu stranga komando devigis desalti la ĉefserĝenton kaj la dek soldatojn. La ĉefserĝento klarigis al ili ke ili devas resti kiel postgvardio por observi la anglojn kaj por poste piede atingi la urbon Lüneburg dum la nokto. Kelkaj soldatoj malbenis pri la daŭra malripozo, la aliaj ankaŭ aspektis ne tre kontentaj, sed neniu malobeis.

Nun la ĉefserĝento ordonis siajn dek soldatojn remarŝi al la urbeto. La enloĝantoj miris pri la reapero de germanaj soldatoj. Subite eksonegis tie la alarmilego kvazaŭ hurlo kaj la enloĝantoj rapidis en la kontraŭaeratakajn ŝirmejojn, ĉar la unuaj anglaj tankoj videbliĝis survoje al la urbeto. La ĉefserĝento ordonis rapidan retiriĝon tra flanka strato norden. Tie estis senarba valetio en kies fundo fluis fonto ĉirkaŭita de kelkaj arboj kaj arbetoj. Tien ili kuregis kaj kaŝis sin en la arbeto, ĉar intertempe videbliĝis kelkaj anglaj soldatoj ĉe la urbeto rando.

La ĉefserĝento kun siaj grupanoj kaŝis sin en la arbeto ĉe la fonto kaj atendis la konvenan eblecon por suprenkuri aliflanken. La ĉefserĝento destinis du soldatojn, ke je posta ordono ili unue solaj supreniĝu, por eviti laŭeble multajn viktimojn. Estis la soldatoj Johann Brinkmann, junulo el Vestfalio, kaj Karl Rotter, 40-jara okcidentgermano. Johann Brinkmann estis nealiigbla optimisto inter siaj kamaradoj. Li estis kamparista filo kaj lia tuta intereso estis la agrikulturo. Eĉ li havis jam planojn pri pli praktika kaj intensa kulturado de la kampoj de sia patro. Li ne timis danĝeron por siaj vivo kaj sano en la batalado kaj eĉ tuj post atakoj li ekparolis pri agrikulturaj aferoj.

Male Karl Rotter estis la plej malfeliĉa soldato en la grupo. Ĝistera bombado de lia okcidentgermana hejmurbo mortigis lian tutan familion. Ankaŭ lia loĝejo tute detruigis. Por li la reveno hejmen signifis jam nenion. Eble la soldato vivo kun liaj kamaradoj estis la sole ebla vivoformo por li.

Post duona horo la ĉefserĝento komandis la du soldatojn ekkuri supren. Rapidmove ili kuris, sed tuj

preterzumis kugloj. Tial la ĉefserĝento kun la aliaj ok soldatoj observis la urbetan randon, kie videbliĝis kelkaj anglaj pafantoj. Tamen malpermesis la ĉefserĝento la repafon, por ŝajnigi ke jam neniu estas ĉe la fonto. Efektive ankaŭ baldaŭ ĉesis la pafado.

Post horo la ĉefserĝento konstatis ke anglaj soldatoj ne plu estas ĉe la urbeto rando kaj li ordonis ke ili ĉiuj suprenkuru. Ĉifoje ili sukcesis nerimarkite atingi la supran randon de la valetio kaj tie ili trovis nevunditajn la du kamaradojn. De tie ili povis konstati ke nur kelkaj anglaj tankoj haltis ĉe la urbeto kaj la ĉefserĝento post iom da tempo ordonis la formarŝon por ne perdi la kontakton kun la kompanio.

Ili tramarŝis la arbetaron kaj venis al kamparo kie kamparano pace kulturis sian kampon. La soldatoj miris pri la paca aspekto. Eble la viro ne sciis pri la proksimo de la militfronto, aŭ li sciis ke jam neniam gravaj bataloj estos, pro la retiriĝo de la germanaj trupoj. Tamen la soldatoj admiris la sentimecon de la kamparisto.

La monteta regiono estis natura kaŝejo por la soldata grupo. Post iom da tempo ili vidis vilaĝeton kaj mallarĝan veturilan vojon. La ĉefserĝento komandis la soldaton Hans Berger tien por konstati ĉu la angloj jam okupis la lokon. La grupo intertempe kaŝis sin en kavoj.

Hans Berger singarde proksimiĝis al la vilaĝo kaj nun kiam li ree estis sola denove regis lin la stranga sento esti nur observanto de la okazaĵoj. La sunlumita idilia vilaĝo antaŭ li kaj la stranga trankvilo ĉie ĝojigis lin. Ĝuste kiam li atingis la ĝardenan barilon de la unua domo surprizite li haltis. En la ĝardeno genuis ĉarma

eble 16-jara knabino kaj plantis ion. Ŝiaj helblondaj haroj falkovris ŝian vizaĝon kaj ŝi ne rimarkis lin. En Hans Berger ekiĝis subite arda deziro ke la milito ne tuŝu ĉi tiun intermontetan valon kaj li preskaŭ ne povis kredi ke en la detruita kaj batalbrua Germanujo ankoraŭ ekzistas tia bildo de paco.

La knabino fervore laboris plue. Hans Berger ne povis disigi sin de la bela aspekto kaj tute ne kapablis paroli al ŝi. Fine li decidiĝis. Li ne volis ĝeni la knabinon per siaj militaj demandoj kaj li volis senvorte foriri, sed jen la knabino levis la kapon kaj vidis lin. Hans Berger senvole ruĝiĝis kaj ĉagreniĝis pro tio. Sed la knabino ĝoje venis kaj donis al li la manon trans la barilon. Nun li tute konfuziĝis kaj ne sciis ion diri. La knabino ne rimarkis tion kaj diris :

“Antaŭ kelkaj horoj pluraj germanaj soldatoj pasis nian vilaĝon, kaj diris ke ili estas la lastaj germanaj soldatoj kiuj tramarŝas nian vilaĝon. Post ili venos nur anglaj soldatoj. Nun mi tre ĝojas ke ankoraŭ germanaj soldatoj estas ĉi tie”.

Ŝi diris ĉion en tre freŝa natura maniero kaj evidente ŝia ĝojo estis sincera. Hans Berger tiel ankaŭ ĝojis, sed la embaraso ne forlasis lin. Li intertempe rimarkis, ke ŝi aspektas tre bela kaj ŝiaj bluaj klaraj okuloj ravis lin. Ŝia helblua printempa vesto eĉ pliigis ŝian belecon.

Ĉar la soldato diris nenion, ŝi demandis lin, ĉu eble li malsatas. Antaŭ ol Hans Berger povis respondi, la knabino daŭrigis : “Mi tuj kuiros dolĉan laktosupon kaj ĝi certe tre bongustos al vi”.

Nun Hans Berger diris fine ke li ne estas sola kaj li rakontis koncize pri sia tasko. La knabino diris : “Ĝis nun ne estis angloj en nia vilaĝo. Mi

arangos ĉion. Kelkaj el viaj kamaradoj manĝos ĉe ni kaj mi petos la najbarojn ke ili gastigu la aliajn”.

Hans Berger ĝojis pri tio kaj kore dankis la knabinon. Forirante li ankoraŭfoje returnis sin kaj ĝentile demandis ŝin pri ŝia nomo.

“Mi nomiĝas Erika”, diris la knabino, kaj ĉarme ŝi ridetis pri la entuziasma rigardo de la soldato. “Kaj mi nomiĝas Hans”, li diris, kaj hezite foriris. Kelkfoje sur la returnvojo li rerigardis al la ĝardeno, sed li jam ne vidis la knabinon. Li pensis pri Erika. Ĉu tiel lia deziro je la erikara florado plenumiĝis ? Strange, ke ŝi havis la nomon de la ĉi-tiea pejzaĝa floro, de eriko ; kaj vere ŝi aspektis kvazaŭ unike bela floro.

La kamaradoj de la grupo akceptis scivoleme Hans Berger. Post la raporto tuj rifuzis la ĉefserĝento la gastigon. Lia tasko estis observi la movojn de la anglaj trupoj, kaj li komandis tujan ekmarŝon norden. Hans Berger ektimis kaj la sopiro al la knabino donis al li la forton por kontraŭparoli. Li atentigis la ĉefserĝenton jene :

“Ni nun alvenos en alian regionon. Ni tramarŝos grandajn senarbajn paŝtejojn inter Lüneburg kaj Hamburg kun malmulte da kaŝebleco. Neniu scias ĉu ni ankoraŭ atingos la kompanion en Lüneburg, kiu ĝustatempe retiriĝos pli norden. La malsato tro turmentis nin en la pasintaj tagoj kaj certe la kompanio ne zorgos pri tio por ni. Nun ni havas unikan okazon por manĝi kaj eble la lastan en ĉi tiuj krizaj tagoj. Mi opinias ke ni ne rifuzu la gastigan inviton”.

La ĉefserĝento surprizite aŭskultis kaj finfine konsentis. Sed li mem volis resti sola ĉi tie por observi la tutan

ĉirkaŭaĵon de la vilaĝeto kaj por ĝustatempe averti la soldatojn se la angloj alproksimiĝus. Li diris, ke je lia signalo per fajfilo ĉiuj tuj revenu.

La dek soldatoj kontente rapidis al la vilaĝeto. Kelkaj vilaĝanoj akceptis ilin, inter ili la knabino Erika. Ŝi diris al Hans Berger ke li venu kun du kamaradoj al ŝia loĝejo. Hans Berger proponis siajn plej karajn kamaradojn kun kiuj li ĉiam estis kune. Estis Johann Brinkmann kaj Karl Rotter. La knabino kondukis la tri soldatojn en tre hejmecan ĉambron, kie atendis jam ŝiaj gepatroj. Afable ili bonvenigis la soldatojn kaj kondukis ilin al la tablo. Erika alportis tuj ujon da varma laktosupo. Ŝi plenigis la telerojn kaj la tri soldatoj manĝis havante bonegan apetiton.

Post tri teleroj da supo Johann Brinkmann kaj Karl Rotter afable dankis kaj Erika demandis Hans Berger ĉu li ankoraŭ deziras teleron da supo. Li hontis, ĉar li fakte sentis ankoraŭ apetiton kaj li ne kuraĝis peti, sed la knabino jam replenigis la teleron.

Intertempe interparolis la mastro kun Johann Brinkmann kaj la mastrino kun Karl Rotter. Johann Brinkmann parolis pri la plej modernaj metodoj de la agrikultura laborado kaj la mastro miris, kiel serioze la junulo jam pripensis sian estontan kamparistan taskon. Ankaŭ la mastro rakontis pri siaj spertoj kaj Johann Brinkmann aŭskultis kun ĝojo.

La mastrino, kiu bone rimarkis la suferon de Karl Rotter, paroligis lin en tre delikata maniero. Karl Rotter vidis simplan arĝentan kruceton je la kolĉeno de la mastrino kaj ĝi kortuŝis lin. Ĝi rememorigis lin pri la mesaĝo de la amo al ĉiuj homoj sur la tero.

“Kial regas tiom da malamo en la mondo, tiom da nacia kaj partia fanatikeco?” preskaŭ senkonscie demandis Karl Rotter la mastrinon.

Ŝi respondis en klara kaj simpla maniero: “Se ĉiuj homoj vivus laŭ la dia instruo de Jesuo Kristo, ne ekzistus malamo kaj milito”.

Senvole ekiĝis fervora interparolado inter ili. Hans Berger, kiu intertempe malplenigis la kvaran teleron da laktosupo kaj tute satiĝis, vidis kun ĝojo ke la trajtoj de Karl Rotter mildiĝis. Sed ankoraŭ pli multe li ĝojis, ke nun la knabino eksidis apud li tuj babilante vigle kun li. Li forgesis ĉion ĉirkaŭ si kaj ne povis deturni siajn okulojn de la ĉarma vizaĝo de la bonkora knabino. Li mem ankaŭ rakontis multon kaj la knabino ĝoje rigardis lin.

Ŝajnis ke ĉiuj en la ĉambro ne rimarkis la senkompatan pason de la tempo kaj ili ektimis pro subita alvoko el la strateto, kie la aliaj kamaradoj jam staris por formarŝi. Ankaŭ la ĉefserĝento alproksimiĝis. Ĉiuj en la ĉambro malĝojis pri la necesa disiĝo. Hans Berger lastfoje kaj adiaŭe ĉirkaŭrigardis en la bele meblita ĉambro. Ĉiokaze li vidis gitaron en angulo kaj demandis la knabinon, ĉu ŝi povas ludi gitaron. Ŝi kapjesis kaj tuj Hans Berger petis ŝin kanti iun belan popolkanton kaj akompane ludi la instrumenton. Ankaŭ la aliaj du soldatoj petis same ŝin, kaj post mallonga hezito Erika iris kun la gitaro eksteren. Antaŭ la enirejo ŝi iom agordis la gitaron kaj poste iom mallaŭte, sed belvoĉe, ŝi kantis la belegan kanton de la Lüneburga Erikejo. Apud ŝi staris la gepatroj, Hans Berger kaj la du kamaradoj; sur la strato la aliaj sep soldatoj. Tiel vidis ilin la ĉefserĝento, kiu nun atingis ilin. Li

tute ne estis malkontenta, ĉar lin mem kortuŝis la kanto kaj la paca aspekto.

Post finiĝo de la kanto ĉiuj mallaŭte, sed entuziasme, aplaŭdis. La gepatroj de Erika petis ke ili restu ankoraŭ momenton kaj alportis post kelkaj minutoj pakaĵetojn kun panoj kaj kukoj por la tri soldatoj kaj grandan pakaĵon por la ĉefserĝento. Ĉiuj multdanke akceptis ĉion.

Nun la adiaŭado komenciĝis. Johann Brinkmann invitis la dommastron al sia bieno post militfino, sed tiu nur ridetis kaj diris: "Ni atendu kia estos la militfino, kaj se eble mi volonte venos".

Hans Berger kun dolora sento aŭdis tion. Kia feliĉulo estis lia amiko kiu estis certa pri sia neperdebla hejmo. Kiom volonte li invitus la familion al sia hejmo, precipe la knabinon, sed li ja certiĝis pri sia senhejmeco. Fine li premis la manon de Erika kaj reciproke ili rigardis sin kaj iliaj rigardoj esprimis kaj feliĉon kaj malĝojon.

"Revenu bone hejmen", ŝi diris al li. Li nur dube ridetis kaj ŝi daŭrigis: "Se ne estas eble, revenu al ni".

Ŝi diris tion tre mallaŭte, kvazaŭ al si mem, sed Hans Berger tamen komprenis ŝin. Ŝi turnis sin kaj reiris malĝoje al la enirejo. Nur nun li ekkomprenis la plenan signifon de la diritaĵo kaj ĉar ŝi jam tuŝis la anson de la pordo, li laŭte vokis por ne malfrui: "Jes, mi venos!"

La knabino returnis sin kaj la feliĉo lumis en ŝiaj okuloj. La aliaj personoj surprize rigardis al Hans Berger, sed komprenis nenion kaj tial daŭrigis la adiaŭadon.

La soldatoj ekmarŝis, kaj nun denove regis la silento inter ili. Iel ili ja devis observi la pluan antaŭeniĝon de la angloj, sed samtempe ili sentis

ke okazos aliaj aferoj kiuj vanigos ilian klopodon. Ankaŭ la ĉefserĝento meditis similmaniere.

De la surmonteta vojo ili ne havis bonan perspektivon. Orienten ĝi kondukis al Lüneburg. Tien la ĉefserĝento celis, ĉar li deziris plej rapidan rekuniĝon kun la kompanio. Sen la kompaniaj ordonoj li ne kapablis imagi ilian pluan agadon.

Ĉe vojkurbiĝo sentis Hans Berger ion strangan, kvazaŭ io magneta devigis lin rerigardi. Returnante sin li vidis la pacan vilaĝeton kaj kun ĝojego li ekvidis ĉe la ĝardena barilo de la unua domo, jam malproksime, la knabinon Erika. Ŝiaj blondaj haroj lumis en la sunhelo kaj blankan tuketon ŝi nun adiaŭe salutsvingis. Ondo de feliĉo trafluis Hans Berger kaj li same svingis poŝtukon. Sed la alvokoj de la kamaradoj devigis lin iri pluen.

Orienten ili marŝis konstante kaj post iom da tempo ili vidis ke la veturila vojo poste direktiĝos tra la arbaro. Subite ekaŭdiĝis ree la tondra tankara bruado el suda direkto kaj nun la grupo sciis, ke denove la anglaj tankoj ruliĝas antaŭen sur la ĉefŝoseoj kie en la antaŭtagmezo veturis la propra kompanio al Lüneburg. Eĉ ŝajnis ke la sama bruado venis el nordo. Certe ambaŭflanke estis ŝoseoj preskaŭ paralele al la veturila vojo kie troviĝas la grupo kaj sur ambaŭ ŝoseoj ruliĝis nun la tankoj de la angloj. La soldatoj konsciiĝis ke la du ŝoseoj kaj ankaŭ la veturila vojo direktiĝas al komuna fokuso, kiu estas Lüneburg. Tial la distanco inter la ŝoseoj kaj la veturila vojo meze minimumiĝos ju pli ili proksimiĝos al Lüneburg. Tio signifis ke post kelkaj horoj ili atingos la urbon, kiun de ambaŭ flankoj jam antaŭe atingos la angloj. Plue tio signifis ankaŭ, ke la

propra kompanio forlasas jam nun la urbon Lüneburg en nekonatan direkton.

Tial nepre la grupo devos kaŝmarŝi tra la angla frontlinio por atingi la propran kompanion, sed tio estos tre malfacila pro la ebena tereno. Certe kiam ili forlasos la monteton, antaŭ ili estos nur la senŝirma vasta ebena, laŭ ilia supozo.

La tankara bruado post iom da tempo ĉesis. Certe Lüneburg estis nun, aŭ estos baldaŭ, okupata de la angloj.

La grupo alproksimiĝis al la arbaro. Kelkaj blankaj papilioj flirte flugetis trans herbejon. Karl Rotter sentis ke neniu rajtas ĝeni la dian ordon en la naturo. Ĉi tie estis paco kaj li sentis tutkore ke paco estas sankta.

Tre malrapide marŝis nun la soldatoj, kvazaŭ ili instinkte sentis ke nur nun ilin ĉirkaŭas la paco, al kiu ĉiuj homoj sopiras. La suno malrapide subiris. Timema leporo transkuris la vojon, apud la arbara rando aperis kelkaj kapreoloj kaj rigardis al la soldatoj. Tiom paca estis ĉio ankoraŭ sur la monteto.

La ĉefserĝento tre meditemiĝis. Li klare nun konsciis pri la vaneco de ĉiuj defendaj klopodoj. Hieraŭ ankoraŭ ekzistis germana rezisto, sed hodiaŭ li nur malofte aŭdis iom da unuopa maŝinpafado. Jam longe mankis germana subteno per tankoj kaj aeroplanoj. La kontraŭuloj havis ĉion abunde kaj la germanoj plejparte nur defendis sin per pafiloj kaj maŝinpafiloj, aŭ per malmultaj kanonoj. Sed li estis malnova soldato kaj li havis ankoraŭ taskon — atingi la kompanion. Tial li decidis resti en la monteta arbaro dum la nokto kaj ekmarŝi antaŭ la krepusko ĝis la proksimo de la urbo Lüneburg por konstati la anglan okupon kaj esplori

kien la anglaj trupoj moviĝas.

Sed io alia turmentis lin. Se fakte evidentiĝus, ke ili jam ne povos kaŝmarŝi tra la angla frontlinio, li devos militi kun sia grupo en angle okupita teritorio je propra decido, kaj tion li ne volis. Tial li decidis ĉikaze indulgi siajn grupanojn por ke ili ne perdu la vivon en la lasta momento. Por si mem li ne havis deziron. Li estis ja kuraĝa kaj brava soldato, tre severa al liaj subuloj, sed fakte lia vivo estis nur plenumado de soldataj devoj. Ion alian li ne povis imagi.

Intertempe la grupo atingis la arbaron kaj la ĉefserĝento ordonis halton. La soldatoj kuŝiĝis je la arbara rando. La ĉefserĝento diris ke ili nun povos ripozi ĝis la kvara matene sen posteni, ĉar li ne timis ĉinokte ian ĝenon, kaj li mem ne intencas dormi.

La suno tute subiris. La soldatoj ĝuis la ripozon. Ili rigardis al la kampoj kaj herbejoj, de kie ili venis. La vojo kondukis pluen tra la arbaro kaj nun ĝi tie tute mallumiĝis pro la ombroj de la arboj dum la vesperiĝo. Pli bone la soldatoj vidis la siluetojn de kelkaj paŝtiĝantaj kapreoloj proksime sur la herbejo.

“Kiom bela estas tia aspekto en tiu ĉi paca vespero!” Tion ĉiuj pensis, eble ĉar ĉiuj sopiris la pacon, kvankam ja certe ĝi ankoraŭ ne venis por la germanaj soldatoj, ĉar la venonta malvenko nepre signifos milit-kaptiĝon.

Laŭ la antaŭdiro de la ĉefserĝento ili ne estos ĝenataj ĝis la kvara matenhoro. Nun neniam danĝero minacis, tion ili konvinke sciis kaj tial iliaj nervoj malstreĉiĝis.

Johann Brinkmann pensis pri vespera paŝado tra la kampoj de la patro, kaj li akre sentis subite nostalgion, sed baldaŭ lia bonhumoro

venkis, ĉar li estis konvinkita ke post mallonga tempo li estos hejme kaj tiu penso tiel trankviligis lin ke li duondorme ankoraŭ perceptis la muĝadon de la arboj pro la plifortiĝinta vespera vento kaj poste li jam profunde ekdormis.

Hans Berger ankoraŭ maldormis. La muĝado de la arbaro kaj la trankvilo rememorigis lin, kiom lia patrineto amis la arbaron. Klare li sciis sian vojon nun. Unue li volis serĉi siajn familianojn por helpi ilin laŭeble kaj poste li volis reveni al la knabino Erika. Ĉi tiu lasta penso subite tre feliĉigis lin kaj senvole ankoraŭ li ekdormis.

De la tri kamaradoj sole Karl Rotter ankoraŭ maldormis. Li meditis pri la interparolo kun la dommastrino kaj li sentis sin kvazaŭ liberigita de la inkubo de la tragika okazaĵo, kiu forprenis la tutan familion de li. La ega doloro pro tio restis, sed li ree gajnis intereson por la vivo. Li rigardis ĉirkaŭen kaj vidis, ke ĉiuj kamaradoj jam pace dormas. Nur la ĉefserĝento sidante apogis al arbo kaj streĉe rigardis ien.

Karl Rotter sentis kompaton al ĉi tiu viro, kiun neniu tre ŝatis kaj kiu estis same soleca kia li. Kvankam kiel grupestro la ĉefserĝento estis tre severa kaj tial ne ŝatata, tamen Karl Rotter sciis ke li pli multe postulas de si mem ol de siaj soldatoj.

Nokta silento regis. Kelkfoje ankoraŭ birdeto dormeme pepetis, sed nun ĉio trankviliĝis. Karl Rotter ne plu pensis pri la morgaŭo. Li rigardis la briletantan stelaron kaj li subite konsciis, kia eta punkteto estas la tera planedo en la eterna kaj senfina universo, kien li nun rigardis. Preskaŭ rifuĝis lia rigardo al la senfine malproksimaj astroj, kiuj nun tiel pace briletis. Estis al li kvazaŭ li

povas forlasi por momento la teron kun ĝiaj suferoj kaj militoj. Li sentis la ĉiopovon de Dio kaj li dankis Lin pro ĉi tiu nokto, pro la oazo en lia danĝerplena vivo. Nun ankoraŭ Karl Rotter dormis.

Sole la ĉefserĝento duondorme gardis siajn soldatojn kaj la arbaro muĝis mallaŭte sian ĉiam saman melodion.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Fechter. Al Ges. Juda Fechter (Kirkat Šmona, Izraelo) naskiĝis filo Uri-Šraga je la 12a de februaro 1953.

Jakobsen. Al Ges. L. Jakobsen (Carit Etlarsvej 14, Aabyhøj, Danlando) naskiĝis filo Hans Laurids je la 16a de majo 1953.

Molera Pedrals. Al Ges. Molera Pedrals (C. Hospital 13, Moyá, Barcelona, Hispanujo) la 5an de aprilo 1953 naskiĝis filo, Jaume.

Edziĝoj

Fechter-Haroch. Je la 3a de majo 1953 Eveline Fechter kun Isaac Haroch en Beer Ševa, Izraelo.

Sly-Reed. Je la 4a de aprilo 1953 S-ro Ken Sly kun F-ino Sybil Reed (200 Nevells Road, Letchworth, Herts., Anglujo).

Al ĉiuj ni esprimas sinceran gratulon.


Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ne volas esprimi nian profundan kondolencon.

Cather, S-ro William Arthur, Torquay, Anglujo, mortis la 4an de marto 1953, 75-jara.

Horne, F-ino Carrie, Huddersfield, Anglujo, mortis la 15an de majo 1953. Fidela subtenanto dum multaj jaroj.

Josefsson, F-ino Helmi, Stockholm, Svedujo, mortis la 15an de marto 1953. Fidela Esperantistino de 1909.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.


En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.
Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Lundo	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	21.45–22.15	Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.40–07.45	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.20	Zagreb. 264.7m. I.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 12-VI). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Responde al la alvoko aperinta sur p. 128 de la Aprila numero de ĉi tiu revuo ni ĝis nun ricevis nur malmultege da informoj. Ni dankas la kelkajn legantojn, kiuj bonvolis sciigi nin pri aŭdebleco de la diversaj Esperantlingvaj elsendoj kaj bedaŭras, ke ni ne povas rekompence havigi al ili valorajn informojn, ĉar ili ĉiuj loĝas en la sama lando.

Ni denove invitas aŭskultantojn kompletigi nian dokumentadon pri ia “radio-geografio”. El la jam konataj elementoj ni provos en la venonta numero komenci raporton, kiu estos interesa nur se sufiĉe da diverslandaj personoj partoprenas en ĝia konstruado.



Enigma Konkurso N-ro 79

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkuponon internacia.

Solvoj.

N-ro 176 : Tempo toleras, sed vero aperas. latero, kolego, domeno, empiro, boligi, baletto, ŝofori, ribela, merito, merino, variko, kresto, oponis, neceso, modeli, divano, deteni, teroro, baloto, vanelo, separo, paketo, kardio, sekalo, fokuso.

N-ro 177 : Unuaj vortoj ekz : ventro, kabano, albino, dilemo, soneto, drakmo, trofeo, sklavo, skarpo, skabio, karato, oblato, klafto, dolaro, krispo, diablo, frosto, barako, krampo, tarifo, artikio, akordo, grajno, branko.

N-ro 178 :

En bona hor' ! Ni aŭdis la signalon
Kaj bataleme saltas nia koro.
Konduku nin, komencu la batalon
Sub bona stelo, en feliĉa horo !
Amikoj de proksime, malproksime,
Salutas vin, ho nia luma stelo !
Konduku nin, senhalte kaj sentime,
Al nia granda, sankta, glora celo !

L.Z.

Originala Verkaro, paĝo 591.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 75-a konkurso : S-ro V. Marccone (Ital.) 173, S-ro J. Escaré (Franc.) 159, S-ro H. Evers (Ned.) 156 p.

Enigmo N-ro 182 : Serĉu 13 vortojn, kiuj sinsekve konsistas el 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 8, 7, 6, 5, 4, 3 literoj. La dua vorto enhavu la 3 literojn de la unua + kvara litero, la tria vorto enhavu la 4 literojn de la dua + kvina litero, ktp., la oka vorto enhavu la 9 literojn de la sepa minus unu litero, la naŭa vorto enhavu la 8 literojn de

la oka minus unu litero, ktp. Ĉiuj vortoj estu diferencaj. Konsilo : Klopodu trovi unue taŭgan mezan vorton.

Enigmo N-ro 183 : El la vortoj : ŝalupo, prologo, rimarki, oni povas fari novan trisilaban sepliteran vorton : marŝalo, prenante po unu silabo el la tri donitaj vortoj. Agu tiel kun la sekvantaj trio da vortoj, tiel ke la mezaj literoj de la novaj vortoj formu proverbon.
suspekti-piastro-prestiĝo ; pardoni-ĉagreni - najado ; poluri - manovri - frizisto ; barakti-kolombo-solena ; soriko-perturbo-markizo ; legomo-nufaro-siringo ; margeno-pedanta-karato ; cigano - padeli - nuncio ; rabato - penetri - kobalto ; lozanĝo - pasero - rajtigi ; kojoto - absinto - romanco ; kolimbo-arbitra-agrafi ; timono - kadeto - kolbaso ; agrabla - detalo - dilemo ; grafito - maristo - veturi ; ĝemelo-hetmano-bonŝanco ; fekunda-dolaro-selakto.

Enigmo N-ro 184 : Reordigu la ĉi-subajn litergrupojn tiel, ke vi trovas kvin esprimojn el la Proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. as - er - ga - is - iu - jn - ka - ki - ne - st - un.
2. ak - am - em - fl - ie - ig - iĝ - ll - na - no - re - zi.
3. ah - as - bo - er - et - fr - im - lb - ma - nn - on - os - to.
4. ad - as - do - ig - ld - lo - ma - ng - nk - oj - or - re - sk - ŝu.
5. ak - al - as - as - en - in - iu - kl - nm - oĉ - on - os - pl - tr - vi.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 250.

2-an de Majo 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Aprilo, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	3394	3733
Individuaj membroj :		
MJ 698		634
MA 3344		3279
MS 439		503
Patronoj .. 8		6
DM 256		259
HM 57		58
	4802	4739
	8196	8472

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Kaltenleutgeben. D : J. Pich, Hauptstrasse 63, Wien XXV, Kaltenleutgeben. Tel : 11.

Britujo

Stafford. D : vakas.

Francujo

Besançon. FD (Instruado) : vakas.

Le Havre. D : M. Bosc, 98 rue Casimir-Delavigne.

FD (Komerco) : La D.

Thouars. D : vakas.

Germanujo

Passau. VD : G. Robl, Grünastr. 29 b, (13b) Passau. Tel : 2263/374.

Kubo

Sagua la Grande. D : B. Tiomno, Apartado 279.

Nederlando

Aalsmeer. D : vakas.

Norvegujo

Harstad. D : E. Bjerkaas, S/L Nord Norges Salgslag. Tel : 2803.

Sud-Afriko

Johannesburg. D : E. W. Woodruff, Witwatersrand Technical College, P.O. Box 3293.

Svedujo

Stockholm. FD (Reklamado) : vakas.

Usono

Bell Gardens (Cal.). D : vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

471. Marmol, S-ro A., Rabat, Maroko
472. Gayfer, S-ro W. T., Cleethorpes, Anglujo
473. Guise, S-ro W. C., Rugby, Anglujo
474. Bemaldo, S-ro L., Lisboa, Portugalujo
475. Martins da Cruz, S-ro A. B., Benguela, Angolo
476. Linnander, F-ino S., Stockholm, Svedujo
477. Sykora, S-ro M., Bački Petrovac, Jugoslavujo
478. Fraser, S-ro T. C., Kirkcaldy, Skotlando
479. Allen, S-ro H. C., Kings Lynn, Anglujo
480. Westergaard, S-ro H., Børkop, Danlando
481. Montserrat, S-ro F., Barcelona, Hispanujo
482. Pueyo, S-ro D., Barcelona, Hispanujo
483. Bøe, S-ro J., Leknes, Norvegujo
484. Loof, S-ro R. H., Canberra, Aŭstralio
485. Robinson, S-ro K. E., Croydon, Anglujo
486. Supremovicz, S-ro A., Cheltenham, Anglujo
487. Eichinger, S-ino M., Wien, Aŭstrujo
488. Ullrich, S-ro W., Wien, Aŭstrujo
489. Olsson, S-ro N., Höör, Svedujo
490. Carrfors, S-ro H., Bromma, Svedujo
491. Karlsson, F-ino H., Klippan, Svedujo
492. Olsson, F-ino A., Göteborg, Svedujo
493. Söderberg, S-ro K., Upsala, Svedujo
494. Larsson, F-ino E., Boden, Svedujo
495. Unchitti, S-ro C. L., Bangkok, Tajlando
496. Ehbauer, S-ro M., München, Germanujo
497. Henneberg, D-ro T., Kamen, Germanujo
498. Jung, S-ro H., Horrem, Germanujo
499. Rieckhoff, S-ro O., Lemförde, Germanujo
500. Mazzantini, D-ro R., Milano, Italujo
501. Belinfante, D-ro F. J., Lafayette, Ind., Usono

Korekto :

355. Philippe, S-ro M., Tanger, Maroko

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : F-ino K. A. Goodliffe 5ŝ., F-ino E. M. Pearson, 5ŝ., E. Mila 9ŝ., F-ino F. Wadsworth 2ŝ. 6p., H. P. Saunders 1ŝ. 6p.

DONACO al la Propaganda Konto : T. J. Gueritte £10.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Feliĉaj estas la homoj, kies forto estas en Vi, kaj en kies koro estas Viaj vojoj.
Ps. 84. 5.

Ses novaj geesperantistoj serĉas korespondadon kun la tuta mondo. Skribu al S-ro Richard Hirsch, Wallengasse 20, BAD HERSFELD, Germanujo.

Internacia utiligo de patentoj, novaĵoj, k.t.p. — organizo kaj administrado — oni serĉas kiel agentojn en evoluantaj landoj po unu kunlaboranton nemaljunan, seriozan, teknike kaj komerce rutinan. Garantio necesas ! Eventuale kompanio. Interutiligo reciproka. S-ro Otto Boesl, Rosenheimerstrasse 115, MÜNCHEN 8, Germanujo.

Proverbaro Esperanta de d-ro Zamenhof urĝe bezonata. Bonvolu fari prezoferton al O. Walder, Eigenheim, ROMANSHORN, Svislando.

Vidu jarlibron paĝon 170 ! Faldprospekton kun esperantlingva aldono sendos kontraŭ unu rpk. : Ernst Kind, Del. UEA., Nordstrasse 97, BONN, Germanujo.

Ringwood Grammar School (Fondita en 1577), West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al Ĝenerala Eduka Atesto aŭ por libertempoj.

Ĉu vi volas kuniri min Zagreben ? Mi iros tra Francujo, Svisujo kaj Italujo per motorbiciklo, tendumante survoje. S-ro R. B. Shepherd, University College, HULL, Anglujo.

Al Britoj. Kiu volas kontraŭ pago aŭ facila laboro gastigi 13-jaran knabinon, kiu parolas Esperanton, el Svedlando dum la somero ? Henry Lindgren, Brunnbäcksgatan 18 b, HÄLSINGBORG, Svedujo.

Samideano 43-jara deziras korespondadi, prefere kun landoj Skandinavaj, Germanujo, Nederlando. Nepre respondos. Diksztejn, Järnagatan 8, SÖDERTÄLJE, Svedujo.

Aŭgustajn feriojn apud Parizo vi pasigos luante loĝejon de Samideano Tribouillard, CHESSY par MONTEVRAIN (S. et M.), Francujo.

Internacia Kultura Semajno, 3-10 Aŭgusto 1953, en Kultura Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono G. Odent, Lycée de LAON, Aisne, Francujo. Represo petata.

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de junio ĝis septembrofino ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE, M-et-L., Francujo. Represo petata.

La Nova Kristaneco en la lumo de scienco, bazita je la universala analogio kaj je la interna senco de sankta Biblio, anoncita en verkoj de sveda scienculo kaj reformanto Em. Swedenborg, malkaŝas la misteron de homa animo kaj postmorta vivo. Postulu la traktatojn senpage. Aldonu rpk. Adr. Jan B. Vlach, Lužická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakujo.

Belga Fremdultrafika Servo, Konijnenperken 109, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo, rezervas hotelĉambrojn, dissendas turismajn prospektojn (1 rpk.). Rekom pencos pro publikigo.

Advokato 26-jara deziras korespondi : José Cerato, Necochea 222, JUJUY, Argentino.

Mondfestivalo—Bukaresto 1953. Por komuna aranĝo kontaktu Bindner, "Vivu", Poppel alle 76, HARESKOVBY, Danlando.

Lernejestro G. Mol, Munnikenweg 7, WESTMAAS, Nederlando, havas kun siaj gelernantoj klubon de poŝtmarkkolektantoj. Kiu sendos al li poŝtmarkojn por tiu klubo ?

PREMIAJ ROMANETOJ

23 interesaj noveletoj diverstemaj
verkitaj de konkursintoj.

96 paĝoj afrankite 1ŝ. 2p. aŭ 4 rpk.

Mendu ĉe U.E.A.

BONVENA DONACO

je Kristnasko je datreveno
kiel dankesprimo

MORTO DE TRAJNO

de Freeman Wills Crofts

(fama angla verkisto de
detektivaj romanoj)

tradukita de Mason Stuttard

Tole bindita, kun plurkolora polvŝirmilo
256 paĝoj 9 ŝil., afranko 6p.

Eldonita de

ESPERANTO PUBLISHING Co. Ltd.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

HELSINGÖR

Internaciaj Feriaj E-kursoj

18-25 de julio

Konversacia kurso, prepara kurso por
Cseh-metodaj geinstruontoj. Daŭriga
kurso, k.t.p.

Unu semajno inter centoj da ge-
samideanoj el 10-15 diversaj landoj.
Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9,

Aabyhøj, Danlando.

ESPERANTO

Tole-binditaj volumoj

1951 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr.
al aliaj 10ŝ. 6p.

1952 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr.
al aliaj 10ŝ. 6p.

Mendu ĉe U.E.A.

Notu, ke ni sendas volumojn po 5ŝ. 6p.
NUR rekte al la koncernaj MA.

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva
perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj
problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto
spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma
politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo .